

Esperanto 287

aktuell



43. Jahr (2024) №5 (287)

Informationen für Esperantofreunde in Deutschland und Österreich



Renkontiĝo de Esperantaj Familioj (REF) ▲ en Geyer, Saksio. Interkultura Centro Herzberg: Gastoj el multaj landoj aperas en la Esperanto-urbo. Granda varbkampanjo per firmao NETTO por Esperanto. Aŭstria Esperanto-Federacio: Generalversammlung des Österreichischen Esperanto-Verbandes (AEF). Zamenhof-festo en Vieno. Aranĝoj en eksterlando: UK en Tanzanio. Pola E-Kongreso – preskaŭ sen germanoj. Historio: Ein Polenfreund und Nazifeind im Dritten Reich. Aranĝoj en Germanio: 41-a! Printempa Semajno Internacia 2025 okazos en Hellenthal, Nordrejn-Vestfalia. Publika agado: Bundeswettbewerb Fremdsprachen. Bestätigung der Gleichberechtigung des Esperanto durch die EU. GEJ-Gazeto – revueto de Germana Esperanto-Junularo: IJK 2024: Pli multe da ekskursoj ol dum averaĝa IJK. Sukcesa kongreso kun agrabla etoso. BaRok Koncertos Dum JES 2024-2025! JES 2024-2025: Perfekta Jarŝanĝo en Belgio!

Deutscher Esperanto-Bund e.V. Germana Esperanto-Asocio r.a.

Amtsgericht Berlin VR 13651 B
www.esperanto.de/deb (Netzpräsenz)

Bankkonto (por membrokotoj kaj donacoj) /

Bankverbindung (für Mitgliedsbeiträge und Spenden): HELADEF1ERB, Sparkasse Odenwaldkreis, DE 3250 8519 5200 4011 4571.

Spenden und Mitgliedsbeiträge für den D.E.B. sind steuerlich abzugsfähig.

Oficejo / Geschäftsstelle: Esperanto-Laden
Katzbachstr. 25, 10965 Berlin,
Leitung: **Elke Mondorf**

030 / 5106 2935, 0800 336 3636

Fax: 030 / 4193 5413

gea.oficejo@esperanto.de

Membroprizorgado / Mitgliederbetreuung

DEB: 0800 – 3 36 36 36 – 21

DEJ: 0800 – 3 36 36 36 – 22

Briefpost senden Sie bitte, soweit keine andere Anschrift angegeben, an die Geschäftsstelle. Sie wird von dort elektronisch weitergeleitet. Die angegebenen **Telefon-Durchwahlnummern** sind nach der Rufnummer **0800 - 3 36 36 36** zu wählen.

Estraro GEA / Vorstand DEB

Netzpost an / retmesaĝo@gea.fe@esperanto.de

Jedes Vorstandsmitglied ist individuell erreichbar per E-Post-Adresse in der Form vorname.name@esperanto.de.

Prezidanto / Vorsitzender

Martin Haase, Durchwahl: -5111

gea.prezidanto@esperanto.de

Vicprezidanto / Stellv. Vorsitzender

Andreas Emmerich, Durchwahl: -5112

Trezoristo / Kassenwart

Reinhard Pflüger, Durchwahl: -5113

Sekretario / Schriftführer

Nils Brinkmann, Durchwahl -5125

Administrado / Verwaltung

Jean-Paul Kuhfahl, Durchwahl -5124

Membroadministrado/Mitgliederverwaltung

Steffen Möller, Durchwahl -21

Librokatalogo/Bücherkatalog

Barbara Brandenburg, barbara.brandenburg@esperanto.de

Suborganizoj / Unterorganisationen /

Erasmus+ Andreas Diemel, Durchwahl: -5114

Informteknologioj/Informationstechnologie

Clemens Fries, Durchwahl: -5119

Meza generacio / Mittlere Generation

Michaela Stegmaier: Durchwahl: -5126

Jugendvertreter / Junulara reprezentanto

Jonas Schulz, Durchwahl: -5118

Germana Esperanto-Junularo /

Deutsche Esperanto-Jugend

Michael Vrazitulis, Durchwahl: -5211

michael.vrazitulis@esperanto.de

Komisiitoj / Beauftragte

esperanto.de/deb/beauftragte

Informteknologioj/Informationstechnologie
Franz Kruse

Gazetaraj kaj publikaj aferoj

/Presse und Öffentlichkeitsarbeit

Louis von Wunsch-Rolshoven,

Durchwahl: -111 • Fax Durchwahl: -112

louis.von.wunsch-rolshoven@esperanto.de

Komisiito por retaj kunvenoj / Beauftragter

für virtuelle Treffen Heinz-Wilhelm Sprick,

gea.zoom@esperanto.de, tel. Durchwahl -5128

Komisiito por rondvojaĝoj/ Rundreisen,

Durchwahl -5123

Uli Ender, uli.ender@esperanto.de

Informmaterialo/Informationsmaterial

Goar Engeländer, Durchwahl: -5127

goar.engelaender@esperanto.de

Medienecho

Hermann Kroppenber, Durchwahl: -5121

medienecho@esperanto.de

Libroservo / Bücherdienst

D-ro / Dr. **Wolfgang Schwanzer**,

Pfarrer-Seegeer-Str. 9, 55129 Mainz, Durchwahl:

-5122, buchversand@esperanto.de, www.esperanto.de/buchversand

Komisiito Interreta Redaktado /

Beauftragter Internetredaktion

Thomas Bormann, Durchwahl: -5117

thomas.bormann@esperanto.de

Vertreter des DEB in der EEU-Versammlung/

Reprezentanto de GEA en la asembleo de

EEU: Jean-Paul Kuhfahl

Durchwahl: -5116

jean-paul.kuhfahl@esperanto.de

Pliaj adresoj / Weitere Adressen

Germana Esperanto-Junularo (GEJ) /

Deutsche Esperanto-Jugend (DEJ)

Katzbachstr. 25, 10965 Berlin,

030/4285 7899, Fax: 030/4193 5412

www.esperanto.de/gej (Netzpräsenz)

Interkultura Centro Herzberg (ICH) /

Bildungszentrum des D.E.B.

Komisiitoj/Beauftragte: **Zsófia Kóródy**

(instruado), **Peter Zilvar** (klerigado kaj kulturo),

Grubenhagenstr. 6, 37412 Herzberg, die

Esperanto-Stadt, 05521/5983, Fax (05521) 1363,

Durchwahlen: -411 (Tel), -412 (Fax),

ich@esperanto.de, www.esperanto.de/ich

Germana Esperanto-Instituto /

Deutsches Esperanto-Institut

Ulrich Brandenburg, Durchwahlen: -431 (Tel),

-432 (Fax), www.esperanto.de/dei

Germana Esperanto-Biblioteko /

Deutsche Esperanto-Bibliothek

p/a. **Karl Heinz Schaeffer**, Schulstr. 17, 73432

Aalen, Durchwahlen: -421 (Tel), -422 (Fax)

bibliothek@esperanto-aalen.de

bibliothek-aalen@esperanto.de

www.esperanto.de/bibliothek

Fondaĵo FAME / FAME-Stiftung

Andreas Emmerich, estraro@fame-stiftung.de

(nur por FAME)

Stiftung Mondo

Hauptstr. 42, 64753 Brombachtal,

030/6920 4846-1, stiftungmondo@gmail.com,

Bankkonto: 151100004, Volksbank Stuttgart eG,

BLZ 600 901 00.

Spenden sind steuerlich abzugsfähig.

Aŭstria Esperanto-Federacio /

Österreichischer Esperanto-Verband

aef@esperanto.at, www.esperanto.at

Esperantomuzeo Vieno /

Esperantomuseum Wien

Palais Mollard, Herrngasse 9, 1010 Wien,

+43/1/53410-731, Postanschrift: Österreichische

Nationalbibliothek, Josefsplatz 1, Postfach 25,

1015 Wien, plansprachen@onb.ac.at, www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm

UEA-ĉefdelegitoj kaj perantoj / Bundes-

beauftragte des Esperanto-Weltbundes UEA

Germanio / Deutschland

D-ro / Dr. **Wolfgang Schwanzer**, Adressen

siehe mittlere Spalte: Libroservo/Bücherdienst

Aŭstrio / Österreich

Leopold Patek, Martinstr. 104/38,

3400 Klosterneuburg, Poŝtel. +43/66473611289,

aon.913548977@aon.at

Esperanto aktuel

ISSN 0942-024 X

Eldonisto / Herausgeber

Deutscher Esperanto-Bund e.V.,

der Vorsitzende (v.i.S.d.P.)

Redaktista teamo / Redaktion:

ea@esperanto.de; **Stano Marček** (Martin/

Slovakio), **Yashovardhan Singh**, Im Johan-

nistal 23, 42119 Wuppertal. Durchwahl: -54

Kunlaborantoj / feste Beiträger:

Aŭstria Esperanto-Federacio

Hermann Kroppenber (Medienecho),

Utho Maier (Bibliotheken), **Peter Zilvar** (ICH)

Presejo / Druck: Alfaprint, Martin, Slovakio

Esperanto aktuel kun **GEL-gazeto** havas ses

numerojn jare kaj estas abonebla ĉe la oficejo

(vidu maldekstre supre) por 19 €

(de eksterlando: 25 €) jare.

Esperanto aktuel mit **GEL-gazeto** erscheint

sechs Mal pro Jahr. Abonnierbar bei der

Mitgliederbetreuung (s.o.). Abonnement: 19 €

(Ausland: 25 €) jährlich; für ordentliche

Mitglieder im Beitrag enthalten.

Anoncoj / Anzeigen:

Skribu al / Schreiben Sie an: deb@esperanto.de

Kontribuoj / Beiträge

Bv. sendi viajn kontribuojn (en formato *.doc

a.s.) al ea@esperanto.de, por n-ro 2024/6 ĝis la

15-a de Novembro 2024. Paperaj kontribuoj nur

esceptkaze, tiam al Yashovardhan Singh (vidu

supre). Senden Sie Ihre Beiträge bitte

(im Format *.doc o.ä.) an ea@esperanto.de,

für Nr. 2024/5 bis zum 15. November 2024.

Papierbeiträge nur im Ausnahmefall, dann

an Yashovardhan Singh (s.o.).



Karaj legantoj,

la rezulto de lastatempaj balotoj en Eŭropo plifortigis naciismajn tendencojn, kiuj kontraŭas la ideon de Esperanto, forigi naciajn barojn por ligi homojn tra la mondo per unu facile lernebla, politike neŭtrala kaj kulture riĉa lingvo. Des pli ĝojige estas por ni, ke sukcesis sendi parlamentanon al la Eŭropa parlamento nova partio, kiu en sia programo favoras Esperanton. Pri tiu ĉi Progresia Partio ni raportas en tiu ĉi numero.

Eble iom kurioza pruvo de la funkciado de Esperanto estas, ke ĝi estas uzata por perfraŭdi monon: Lastatempe mi vidis esperantan version de fraŭda retmesaĝo (tiel nomata "spamo", t.e. nepetita amasmesaĝo). Tio montras, ke Esperanto estas normala lingvo. Espereble, la adresatoj de tiaj leteroj rimarkos, ke temas pri fraŭdo. Ne kredu, ke ĉiuj uzantoj de Esperanto estas bonuloj, des pli, ke artefarita inteligento kapablas esperantigi tekstojn senprobleme.

Apud la unua Universala Kongreso de Esperanto en Afriko, la plej elstara evento de 2024 sendube estis la Eŭropa Esperanto-Kongreso en Strasburgo. Por ĝi Germana Esperanto-Asocio produktigis specialan poŝtmarkon. Ni orientigis la eldonkvanton laŭ la lastjaraj vendoj, ne konsiderante, ke la kongreso okazos en Francio, de kie oni dissendas siajn salutojn per franca poŝtmarko. Laŭ nia iniciato niaj francaj partneroj ankaŭ produktigis poŝtmarkon. Restas do stoko de tiu poŝtmarko en nia oficejo. La poŝtmarko ne perdas valoron, sed estas verŝajne, ke la poŝtaj tarifoj altiĝos venontjare, malpraktikigante la uzon de la restantaj poŝtmarkoj. Sed eble kelkaj el vi volas uzi la poŝtmarkon por siaj kristnaskaj kaj jarfinaj salutoj. Ĝi estas bela atentigo pri

la funkciado de Esperanto, memorigante pri la sukcesa Kongreso en Strasburgo. La germana poŝtmarko kun afranka valoro de 85 eŭrocendoj kostas € 1,25. Mendu kvanton de tiuj belaj poŝtmarkoj kun la kongresa insigno kaj surskribo en Esperanto ĉe la oficejo de Germana Esperanto-Asocio, la Esperanto-Butiko en Berlino.

Komence de Septembro, la estraro de Germana Esperanto-Asocio kunvenis en Bamberg. Interalie, ni preparis la aktivulan semajnfino en Göttingen komence de Novembro kaj okupiĝis pri la planado de venontaj kongresoj. Nia vicprezidanto Andreas Emmerich transprenis la taskon, konsili membrojn, kiuj volas heredi al la Esperanto-movado, pli specife al Germana Esperanto-Asocio, ĉar al abstrakta "movado" ne eblas heredi. Se vi estas interesita, ne hezitu kontakti lin. Kiel mi jam skribis en antaŭaj numeroj de tiu ĉi revuo: unuflanke, heredigo al Germana Esperanto-Asocio povas esti signifa financa subteno, aliflanke eblas per taŭga testamento konservi esperantaĵojn, kiujn neinteresitaj heredantoj eble forĵetos. Komprenoble, vi povas donaci valorajn esperantaĵojn (kaj monon) jam vive. Ankaŭ pri tio, vi povas peti konsilojn de Andreas Emmerich.

Kun grandaj paŝoj la jarfino alproksimiĝas, kaj tiel ankaŭ pluraj jarŝanĝaj esperanto-aranĝoj. Travivi la jarŝanĝon en esperantlingva etoso estas ĉiam tre agrabla sperto. Kaj jam pensu pri la venonta jaro. Nun jam anonciĝas printempaj eventoj kaj ankaŭ la unua aliĝperiodo por la Universala Kongreso en Brno baldaŭ finiĝos. Kiel vi verŝajne jam scias: Germana Esperanto-Asocio venontjare kongresos esceptakaze en aŭtuno: Kunlabore kun nia partnera organizaĵo en Valonio ni okazigos germanbeneluksan, do, ebeneluksan kongreson en la Ejfela montaro de la 2a ĝis la 5a de Oktobro 2025. La kongresan breĉon en Majo 2025 ni uzos por aktivula semajnfino en aŭ proksime de la Esperanto-urbo Herzberg.

Mi deziras al vi bonan legadon kaj belan aŭtunon.

Martin Haase

Enhavtabelo/Inhalt

1: Renkontiĝo de Esperantaj Familioj (REF) ren Geyer, Saksio.

2: Adresoj.

3: Germana Esperanto-Asocio: Karaj legantoj. Enhavtabelo.

4-5: Interkultura Centro Herzberg: Gastoj el multaj landoj aperas en la Esperanto-urbo. Granda varbkampanjo per firmao NETTO por Esperanto. Librodonacoj riĉigas la bibliotekon de Esperanto-Centro Herzberg.

6-7: Aŭstria Esperanto-Federacio: Generalversammlung des Österreichischen Esperanto-Verbandes (AEF). Zamenhof-festo en Vieno. „Revolution“ an Universität: Nikolaus Kopernikus in Esperanto. Stiria esperantisto spertis Aŭstralion kun "familia rilato". Esperantisto el la Respubliko Kongo vojaĝis tra Eŭropo.

8: El bibliotekoj kaj arkivoj: Folge 77 – Aalener Pionier: Siegfried Schlumberger.

9-10: Aranĝoj en eksterlando: UK en Tanzanio – kelkaj impresoj. Pola E-Kongreso – preskaŭ sen germanoj.

11-12: Medienecho.

13-15: Historio: Ein Polenfreund und Nazifeind im Dritten Reich. Foto: Partoprenantoj de la 45a Renkontiĝo de Esperantistaj Familioj.

16-18: Aranĝoj en Germanio: 41-a! Printempa Semajno Internacia 2025 okazos en Hellenthal, Nordrejn-Vestfalio. 45a REF: Gajaj en Geyer. Jarfine al Bielefeld! Luminesk'.

19-20: Publika agado: Bundeswettbewerb Fremdsprachen. Bestätigung der Gleichberechtigung des Esperanto durch die EU. Die Partei des Fortschritts und Esperanto.

21: Kalendaro. Terminaro Someraj Olimpiaj Ludoj. Kisu min veka!

22: Letero de leganto.

25-31: GEJ-Gazeto – revueto de Germana Esperanto-Junularo: Karaj legantoj de GEJ-Gazeto. IJK 2024: Pli multe da ekskursoj ol dum averaĝa IJK. IJK 2024: Sukcesa kongreso kun agrabla etoso. Einladung zur DEJ-Mitgliederversammlung 2024. Mia sperto kun la esperantista komunumo dum Erasmus in Germanio. Ĉu vi iam remis Romie? – La antikva remŝipo sur la Rejno. Sociaj justeco laŭ F. A. Hayek. Taglibro de vojaĝkonkursinto – parto 2. BaRok koncertos Dum JES 2024-2025! BaRok aus Brasilien live bei JES 2024-2025! JES 2024-2025: Perfekta Jarŝanĝo en Belgio! JES 2024-2025: Perfekter Jahreswechsel in Belgien!

32. Germana kaj Beneluksa Kongreso.

Gastoj el multaj landoj aperas en la Esperanto-urbo



Unuflanke estas vere ĝojiga afero, ke ofte vizitas nin respektive la urbon Esperanto-parolantoj el multaj landoj.

Ofte okazas, ke ili ne anoncas sin kaj spontanee aperas ĉe Esperanto-Centro Herzberg. Kelkaj mendas per retsistemoj tranokteblecojn en hoteloj aŭ privataj apartamentoj. Lastatempe ni havis gastojn el Finnlando, Usono, Luksemburgio, Bulgario, Anglio kaj Nov-Zelando.

Esperantistoj, eĉ el foraj kontinentoj ofte subite aperas kaj atendas akompanadon - foje-foje ili restas eĉ dum kelkaj tagoj. La plej multaj jam sufiĉe flue parolas Esperanton, tamen petas multajn informojn kaj kompreneble ili faras multajn fotojn. Kvazaŭ devigaj haltstacioj estas la Zamenhof-placo kun la Zamenhof-monumento kaj la apuda konstanta granda Esperanto-flago, la Esperanto-placo ĉe la stacidomo kun multaj esperantlingvaj informtekstoj.

Sur la vizitagendo preskaŭ ĉiam troviĝas vizito al la bela historia Wolf-kastelo. Tie en la muzeo estas videblaj historiaĵoj kaj sur la supra platformo regule okazas niaj porokazaj Esperanto-fakekspozicioj. Por lernado pri la kastelo, pri la muzeo kaj vidindaĵoj oni povas peti elektronikan gvidaparaton ĉe la kaso kaj uzi t.n. aŭd-gvidilon en kvin lingvoj, inter ili ankaŭ en Esperanto.

La nuna speciala ekspozicio temas pri la fama esperantlingva artisto Otto Dix. Tie vi povas vidi ŝokajn pentraĵojn pri resp. el la teruraj bataletoj de la Unua Mondmilito, unuavice en Francio. Personaj korespondataĵoj en Esperanto pri la teruraj situacioj kompreneble ne mankas. Per tiu Dix volis batali kontraŭ la mortigaj kaj vanaj militoj kaj per tiaj rimedoj li alstrebis pacon.

Multaj Esperanto-turistoj ŝatas viziti ankaŭ la urban bibliotekon, kie laŭ longa muro troviĝas bretaroj kun ampleksaj Esperanto-kolektaĵoj. Tamen oni devas priatenti, ke viziteblo estas nur dum la oficialaj malfermhoroj de la publika biblioteko.

Por la esperantlingvaj turistoj ankaŭ ekskursoj al la vilaĝoj de Herzberg, nome Lonau, Pöhlde, Sieber kaj Scharzfeld estas rekomendataj. Eĉ tie troviĝas salut- kaj informtabuloj en Esperanto.

Kiu jam kalkulis kaj dokumentis ĉiujn surlokajn esperantrilatajn objektojn?

Gastoj spontanee respektive subite aperas kaj ni volonte oferdonas tempon por ili, kvankam ofte mankas tempo por ni prilabori multajn kurantajn Esperanto-aferojn kaj taskojn. Laŭ niaj ebloj ni provas ĉiam helpi al la gastoj, tamen pli ĝojas, se oni antaŭanoncas sian viziton.

Foje aperas vizitantoj, kiuj petas informojn en la germana resp. angla pri Esperanto, la Esperanto-urbo kaj niaj multaj servoj. Ekzemple kelkfoje aperis turistoj el Danlando, kiuj kunligis viziton en nia Harz-montaro kun vizito en la Esperanto-Centro.

Entute ni povas ĝoji, ke Esperanto jam trovis hejmlokojn en nia bela urbeto kaj la Esperanto-objektoj, publikaj ŝildoj kaj informiloj servas la konstantan informadon pri la internacia lingvo. Bonvenon!

Granda varbkampanjo per firmao NETTO por Esperanto



Komence de la nuna jaro ni partoprenis konkurson je favoro por komunitilaj asocioj.

Ni ĝojis, kiam en printempo ni ricevis multajn voĉojn de la loĝantaro kaj pozitivan respondon de NETTO, ke Esperanto-Societo Sudharco kun sidejo en Herzberg am Harz sukcesis en tiu ĉi asocia konkurso.

Klientoj, fakte aĉetantoj, rajtas donaci al ni monon per la redono de malplenaj boteloj ĉe la konata superbazara ĉeno NETTO. En la periodo de Julio 2024 ĝis la 2a de Novembro 2024 ekzistas por nia komunitila Esperanto-asocio specialaj donacisistemoj. La granda vendofirmao uzas plurajn lokajn sed ankaŭ diversajn retkomunikajn vojojn por prezenti la specialan oferton. Ĝojiga fakto estas, ke la firmao NETTO produktis du diversajn grandformatajn afiŝojn, kiuj dum pluraj monatoj varbas per nia emblemo kaj granda, kolora foto por nia asocio ĉe la enirejo de la vendejo.

En la unua sabato de Aŭgusto ni eĉ ricevis permeson por ĉeesta informado de la publiko pri Esperanto. Ni povis starigi informbudon rekte ĉe la enirejo de la superbazaro, deĵoris tie dum kvar horoj kaj disdonis multajn informilojn kaj varbilojn pri Esperanto. Multaj homoj interesiĝis kaj haltis ĉe nia budo, do ni povis persone babiladi kaj informi ilin pri la lingvo, pri Esperanto-agodoj kaj pri niaj servoj. Ni povis konstati, ke por multaj homoj el la Esperanto-urbo Herzberg am Harz kaj ĝia ĉirkaŭaĵo Esperanto estas jam tre konata, publika temo, kaj ili pozitive, subteneme rilatas al la ideo, al la rolo de la internacia lingvo. Ĉiam bonas, se ni aperas en la publika vivo, prezentas nian agadon kaj atestas pri la internacia uzeblo de tiu lingvo.

Ne nur en nia urbo Herzberg, sed ankaŭ en la NETTO-vendejoj de la proksimaj vilaĝoj Wulften kaj Katlenburg-Lindau (ĉe Northeim) ni estas konstante privarbatataj.

Aparte gravis tri specialaj tagoj rilate al la subvencio per la donaco de la valorkuponoj ricevitaĵoj por la redonboteloj. La unua dato estis en Julio, kiam NETTO duobligis la sumon, kiun en tiu tago oni donacas al nia asocio en formo de la valorkuponoj. Do indus kolekti botelojn ankaŭ de konatuloj kaj geamikoj kaj redoni ilin en tiuj antaŭanoncigitaj tagoj.

Ni ne scias pri la jam kolektita sumo, nek havas imagon pri la atendebla fina rezulto de tiu monokolektado, tamen jam nun ĝojigas nin la longdaŭra, konstanta atentigo pri Esperanto kaj pri nia asocio per tiu efika, publika varbmetodo. Ĝojige estas, ke Netto faras la organizan laboron kaj ni kore dankas al ĉiuj bonvolemaj boteldonacantoj por la subteno de nia Esperanto-agado.

Librodonacoj riĉigas la bibliotekon de Esperanto-Centro Herzberg

Dank`al la Esperanto-Centro (Esperanto-Gesellschaft Südharz) kaj la administracio de la Esperanto-urbo ni disponas pri ejoj por libroj, gazetoj, filmoj, sonkonserviloj, historiaj turismaj broŝuroj, kaj aŭd-vidaj, inform- kaj komunikrimedoj.

Dum la jardekoj niaj kolektaĵoj multe kreskis. Inter ili troviĝas multaj fakaj kaj specialaj Esperanto-kulturvaloraj. Plurajn unikajn kaj fruajn objektojn ni aĉetis ĉe aŭkcioj, ĉefe ankaŭ private.

Ofte okazas, ke post la morto de esperantistoj la parencoj, heredantoj simple forĵetas Esperanto-librojn, gazetojn, ktp. Kelkfoje familianoj plenumas la personan peton de la posedinto aŭ mem volas konservi resp. savi la materialojn kaj sendas ilin al nia biblioteko. Ni ĝojas ricevi tiujn pakaĵetojn eĉ se ili kelkfoje tute ne atendite, subite alvenas per poŝto aŭ estas liverataj per la vizitantoj mem. Dum la lastaj monatoj ni denove ricevis multajn heredaĵojn, ekzemple de doktoro H. Bludszuweit el Jena aŭ de Esperanto-movadanoj en Norvegio.

Per tiu-ĉi informrimedo ni tre kore dankas al ĉiuj donacintoj kaj estontaj donacantoj, kiuj volis kaj volas savi la esperantrilatajn materialojn. Ni certigas ĉiujn, ke la materialoj estas ne nur bone ordigitaj, prizorgataj, sed fariĝas parto de vivanta kolektaĵo, kiu estas ofte vizitata kaj uzata de niaj kursanoj, studentoj, partoprenantoj de Esperanto-eventoj en Herzberg kaj vizitantoj al la Esperanto-Centro, Esperanto-urbo.

Aparte ni devas mencii sinjoron Hori Jasuo el Japanio, kiu per poŝto sendis al nia biblioteko kelkajn valorajn, novajn librojn. Kiel konate, li ne nur verkas librojn sed ankaŭ prizorgas ilian eldonadon kaj eĉ sponsoras ilian sendadon al eksterlando. Elkoran dankon pro via subteno al nia biblioteko! La senditaj libroj kompreneble estas je dispono por legantoj, bv. kontakti nin, se vi interesiĝas.

Inter la ricevitaĵaj historiaj materialoj unuavice troviĝas libroj, broŝuroj kaj gazetoj, kelkfoje eĉ kompletaj gazetkolektaĵoj el diversaj landoj. Same aperadas historiaj turismaj broŝuroj, varbiloj, fotoj, bildkartoj, glumarkoj, ktp. Principe ni akceptas ĉion, ja la Esperanto-Centro estas kvazaŭ eta muzeo kaj el la historiaj objektoj ni organizas la specialajn laŭtemajn Esperanto-ekspoziciojn en la kastela muzeo de Herzberg. Dank`al tio jam certe dekmiloj vidis la multifacetajn produktojn de la Esperanto-kulturagado. Do, ĉiaj Esperanto-objektoj estas bonvenaj!

Ofte ni bezonas duoblaĵojn resp. multoblaĵojn por interŝanĝoj aŭ por pludonaco al kursanoj kaj interesitoj. Kelkfoje oni uzas materialojn ricevitaĵoj de ni por studceloj aŭ sciencaj esploroj kaj laboraĵoj. Kelkfoje ni jam fordonacis abundajn Esperanto-materialojn al lernantoj aŭ muzeoj.

Ni ĝojas, ke ni povas helpi per ordigado, konservado, stokado de materialoj. Inter niaj planoj estas ankaŭ la intensigo de skanlaboroj por la riĉigo de la virtuale atingeblaj legajoj. Inter la Esperanto-bibliotekoj kaj arkivoj estu daŭre bonaj kontaktoj, regula kunlaboro por savado de kulturproduktoj de la Esperanto-movado. Nepra necesas konservi valorajn historiajn kulturproduktojn en kunligo kun Esperanto. Estas grave gardi la materialojn en diversaj sekuraj lokoj.

Oni ne povas kredi, ke tiom da senlacaj kaj aktivaj homoj jam dum antaŭaj generacioj kreis neimageblan varian kulturriĉecon.

Ne forgesu ĝustatempe zorgi pri la sorto de viaj privataj aŭ klubaj Esperanto-kolektaĵoj kaj aliaj havaĵoj kaj konsultiĝu kun ni. Bonvolu ankaŭ kontakti nin kaj se vi ŝatus, povus helpi ĉe la plua ordigado kaj listigado kaj katalogado de la akumuligintaj materialoj.

Anticipan dankon por la riĉigo de niaj kolektaĵoj kaj savado de Esperanto-havaĵoj.

Bonvenon en la vivanta Esperanto-medio!





Ankündigung der nächsten
**Generalversammlung des
Österreichischen
Esperanto-Verbandes (AEF)**

Datum: Samstag, den 18. Januar 2025, 14.00 Uhr

Ort: Volkshaus Graz, Lagergasse 98a, Graz

Tagesordnung:

1. Begrüßung, Feststellung der Beschlussfähigkeit.
2. Genehmigung der Tagesordnung.
3. Protokoll der letzten Generalversammlung.
4. Bericht des Obmanns, des Kassiers und der Rechnungsprüfer.
5. Entlastung des Vorstandes.
6. Neuwahl des Vorstandes und der Rechnungsprüfer.
7. Abstimmung über sonstige Anträge und Allfälliges.

Aktiv und passiv wahlberechtigt sowie stimmberechtigt sind alle Vereinsmitglieder mit aufrechter Mitgliedschaft.

Mit freundlichen Grüßen
die Vorstandsmitglieder

Zamenhoffesto en Vieno

La 14-an de Decembro 2024 okazos la
Zamenhoffesto en Vieno.

Tempo: 15:00-18:00

Ni ĝojas pri via partopreno aŭ persone aŭ
interrete. **Ĉeeste:** Polnisches Institut, Am Gestade
7, 1010 Wien. **Virtuale:** en Zoom pere de <http://bit.ly/ZoomZamVieno>.

Detalajn informojn vi trovas en www.eventaservo.org/e/fca17c

„Revolution“ an Universität: Nikolaus Kopernikus in Esperanto

Im abgelaufenen Sommersemester wurde am Institut für Astrophysik, Universitätssternwarte Wien ein Seminar abgehalten, das unter der Leitung von Univ.Dozent Dr. Ernst Pauen als Rahmenthema "Rotation" behandelte.

Mein Beitrag war es, dazu das geschichtliche Thema Nikolaus Kopernikus zu behandeln, der ja 1543 die Rotation der Erde um die Sonne postulierte.

Seine revolutionäre Weltansicht ist auf seinem Denkmal in seiner Geburtsstadt Thorn/Torun mit diesem lateinischen Spruch festgehalten:

CAELI SOLISQUE STATOR
TERRAE MOTOR.


D.h. "Stopper des Himmels und der Sonne, Starter der Erde".

Das, weil er im astronomischen Denken den Himmel und die Sonne anhielt und die Erde in Bewegung versetzte, eine revolutionäre Weltansicht begründend. Im Seminar wurde als publizistische Grundlage dazu das eben erschienene Büchlein von Renardo Föbmeier und Hans Michael Maitzen (beide Mitglieder der Akademie Internacia de la Sciencoj, San Marino) verwendet, die von der Gesamtpublikation **De Revolutionibus Orbium Caelestium Libri VI** des Nikolaus Kopernikus das erste Buch in der Originalsprache der mittelalterlichen Wissenschaft wählten, um es ins Esperanto zu übersetzen, ebenfalls eine nichtethnische Sprache. Das erste Buch von Kopernikus enthält die Rechtfertigung der weltanschaulichen Revolution auf sehr diplomatische Weise (ganz anders als die Argumentationsweise von Galilei, die ja Vatikanische Sanktion zur Folge hatte!). Die Seminaristen erhielten das Büchlein und waren sehr interessiert von vielen Aspekten, die ihnen nicht bekannt waren, zu erfahren.

Prof. Dr. Hans Michael Maitzen (estis en Aprilo 1966 partoprenanto en Esperanto-renkonto studenta en Torun, Pollando).

2024-09-13

Hans Michael Maitzen



Stiria esperantisto spertis Aŭstralion kun "familia rilato"

Somere Ewald Schick, la prezidanto de la Stiria Esperanto-Societo en Graz, vojaĝis al Aŭstralio kaj Nov-Zelando.



La vojaĝon organizis por li lia esperantista amiko Sandor Horvath, hungardevena, poste aŭstra, kiu elmigris antaŭ multaj jaroj kaj nun estas unu el la ĉefaj esperantistoj en Aŭstralio. Nur tiel eblis financi ĉi tiun vojaĝon. Aliflanke, Ewald vojaĝis al la kvina kontinento kun "familia ligo" kaj povis vidi kaj sperti aferojn, kiuj estas neatingeblaj por "turistoj". Lia vojaĝo estis neforgesebla sperto plena de kulturaj renkontoj kaj fascinaj malkovroj. La vojaĝo komenciĝis en Melburno, kie la loka Esperanto-grupo varme bonvenigis lin kaj montris al li la diversajn vidindaĵojn de la urbo. Estis impona vidi kiom vigla kaj aktiva estas la loka Esperanto-komunumo kaj kiel engaĝita ĝi estas al internacia interŝanĝo.

Dum sia vojaĝo li vizitis ankaŭ aliajn urbojn kiel Brisbano, Sidney, Adelajdo kaj Cairns, kie li estis varme bonvenigita de la lokaj Esperanto-grupoj, el kiuj ĉiu preparis por li individuan vizitprogramon tajloritan. Li estis profunde imponita de la diversa naturo de Aŭstralio kun ĝia impresa faŭno, fascina mara vivo kaj unika botaniko. Li spertis kanguruojn, la grandajn, kaj la malgrandajn valabiojn en natura medio kun emerita gardistino, sed ankaŭ la koalojn! Ĉar lia vizito al la Granda Bariero estis plurfoje prokrastita pro altaj ondoj, li anstataŭe vizitis krokodilbienon, sed ankaŭ spertis la voremajn prahistoriajn monstrojn dum boatekskurso en natura medio, kie neniu metas sian manon en la akvon.

Kaj li eĉ povis admiri komodo-varanon en la zoologia ĝardeno.

Li lernis multon pri la miloj da jaroj da indiĝena kulturo kaj ilia rilato al la tero. Aparte kortuŝis lin la gastamo kaj aktiva partopreno de la Esperanto-komunumoj en Aŭstralio kaj Nov-Zelando. Estis inspire vidi kiel homoj el diversaj landoj kaj kulturoj komunikas kaj subtenas unu la alian. Tiu ĉi vojaĝo montris al li, kiel Esperanto povas servi kiel ponto inter kulturoj kaj kiom gravas internacia interŝanĝo ene de la Esperanto-familio.

Pinto de la vojaĝo estis la vizito al la Esperanto-grupo en Auckland, Nov-Zelando, kiu estas tre ligita al la Aŭstria Esperanto-movado. Tie li eĉ rajtis partopreni en vela evento kadre de la Amerika Pokalo (America's Cup), kio estis unika sperto. En Nov-Zelando, Ewald ankaŭ venis en proksiman kontakton kun la maoria kulturo, la plej fruaj enmigrintoj de Nov-Zelando. Li eĉ estis invitita al maoria sanktejo kaj

estis permesita partopreni en ceremonia festado. Veturi sur vojtrajno (Road Train) en Aŭstralio estas same unika: kun ĝis kvar remorkoj pli ol 50 metrojn longaj, pezaj pli ol 100 tunoj, kaj la trakcianta veturilo havas almenaŭ 500 ĉevalpovojn. La vojtrajnoj rajtas veturi nur sur longdistancaj ŝoseoj, sed je 100 km/h, samrapide kiel aŭtomobiloj.

La reveturo al Aŭstrio kondukis lin denove al Melburno, kie oni produktis radio-podkaston pri Aŭstria Esperanto-Komunumo kaj elsendis al granda publiko.

Entute, la vojaĝo al Aŭstralio kaj Nov-Zelando estis riĉiga sperto, kiu malfermis novajn perspektivojn kaj plifortigis lian ligan al la esperantistaro. Ĝi montris kiom grave estas malfermiĝi al aliaj kulturoj kaj kiom da riĉigo povas alporti interkulturaj renkontoj. Ĉi tiu vojaĝo restos por ĉiam en lia memoro kiel ekzemplo de internacia interŝanĝo kaj la diverseco de la Esperanto-familio.

Por tiuj, kiuj ne bonŝancas povi sperti tiajn vojaĝojn per personaj rilatoj, la internacia Esperanto-movado proponas ankaŭ pasportan servon (pasportaservo.org), internacian reton, en kiu esperantistoj en la tuta mondo proponas senpagan loĝadon kaj individuajn vojaĝajn spertojn. La sola postulo estas regi Esperanton, sed vi lernas Esperanton por translima kaj translanda komunikado kaj korespondado. Unuflanke, Esperanto estas nemalhavebla kiam neniu komuna lingvo estas disponebla kiel neŭtrala lingvo, ĝi malhelpas la superecon de parolanto de gepatra lingvo super la parolanto de fremda lingvo.

Mag. Herbert Kampf

Esperantisto el la Respubliko Kongo vojaĝis tra Eŭropo



Afrika esperantisto Espoir Kasati lastatempe entreprenis signifoplenan vojaĝon tra Eŭropo, kun speciala atento al Aŭstrio komence de Septembro.

Dum sia unusemajna restado, li vizitis Vienon, Grazon kaj Bratislavon, kie li renkontiĝis kun lokaj esperantistoj por interŝanĝi ideojn kaj spertojn pri la movado.

Kasati ne nur ĝuis la urbojn, sed ankaŭ esploris vidindaĵojn kiel Schloss Hof kaj Lasee, pliriĉigante sian komprenon pri la kultura heredaĵo de la regiono. Lia ĉeesto estis granda honoro por la aŭstraj esperantistoj, kiuj profitis la okazon por fortiĝi internaciajn rilatojn kaj kunlaboron.

Post fruktodona semajno plena de inspiro kaj novaj kontaktoj, li la 6-an de Septembro revenflugis al sia hejmo en Lubumbashi, Demokratia Respubliko Kongo, kunportante valorajn spertojn por plifortigi la Esperanto-movadon en Afriko.

2024-09-09, **Alfred Heiligenbrunner**
kun stila altigo pere de ChatGPT

Welt der Bücher und Zeitschriften – Esperanto und andere Plansprachen

Aktuelles, Wissens- und Bedenkenswertes aus der Deutschen Esperanto-Bibliothek Aalen

**Folge 77 – Aalener Pionier:
Siegfried Schlumberger**

Esperanto aktuell als Mitgliederzeitschrift deutscher und österreichischer Esperantisten publiziert in der Regel Nachrufe auf verstorbene und verdiente Mitglieder.

Aber als Leiter der Deutschen Esperanto-Bibliothek Aalen kann ich nicht umhin, hier einen Nachruf zu verfassen für einen aufrechten Esperantisten, der nicht (oder inzwischen nicht mehr) zu den Mitgliedern des D.E.B. zählte.

Wie sensibel war man denn in der Nachkriegszeit, wie aufmerksam, wenn es um Aufarbeitung unserer NS-Vergangenheit ging? – Eher wenig, denke ich; das will ich jedoch weder behaupten noch bestreiten.

Aber es wird mir schlecht, wenn ich an die vielen Ämter, nicht nur in Politik, Rechtsprechung, Bildungseinrichtungen etc. denke, die mit Personen zweifelhafter Vergangenheit besetzt waren.

In den 60-er und 70-Jahren war es zwar Thema im Geschichtsunterricht, aber nach meiner Erinnerung nicht so, dass man als Jugendlicher ein Gespür für die Relevanz dessen hatte. Wichtiger erschienen Themen wie „Eiserner Vorhang“, „Prager Frühling“ oder generell die DDR und Leben in Freiheit. – Das galt auch 1980.

In der Nachbarstadt Heidenheim lebte unser späterer Esperanto-Lehrer Siegfried Schlumberger und war aktiv als delegito de UEA in unserer Region.



Untragbar war für ihn, dass 1980 ein Herbert Wohlfahrt *1911-1999* aus der DDR nach Heidenheim übersiedelte und ebenfalls UEA-delegito war. Siegfried konnte das

nicht tolerieren und musste sich zu Wort melden.

Warum? Herbert Wohlfahrt war eben nicht nur Esperanto-Anhänger ... er war auch SA-Rottenführer, und so hatte er in Konkurrenz zum Deutschen Esperanto-Bund am 9.2.1931 den „Nationalsozialistischen Deutschen Esperanto-Bund“ gegründet, dem aber die NSDAP die Verwendung der Bezeichnung „nationalsozialistisch“ untersagte. Umgehend wurde der Name der Bewegung in „**Neue Deutsche Esperanto-Bewegung (NDEB)**“ geändert.

Siegfried Schlumberger blieb aufrecht, hartnäckig und hatte Erfolg damit: UEA reagierte wunschgemäß, wie man in Marcus

1) S. 209 in Sikoseks Dissertation „Die neutrale Sprache“ (2006), <https://dspace.library.uu.nl/bitstream/handle/1874/13710/full.pdf>



Sikoseks Dissertation „Die neutrale Sprache“ (2006) lesen kann: „Wohlfahrt, der übrigens behauptete, nicht jener NDEB-Gründer zu sein, wurde aus dem Delegiertenamt entfernt.“

Als einer der Nachgeborenen kann ich da nur sagen: **Chapeau! – Hut ab!**

Und wieso liegt unserer Bibliothek dieser Nachruf so am Herzen?

Dass Esperanto in Aalen Tradition habe, hört man hier in der Stadt gerne. Nüchtern betrachtet geht diese Tradition nicht ganz so weit zurück, denkt man an Gruppen wie die Nürnberger oder so.

Aber ohne rührige, aktive Esperanto-Gruppe vor Ort gäbe es hier in Aalen keine Deutsche Esperanto-Bibliothek und auch keinen Aalener Esperanto-Kulturpreis, das ist sicher.

In der Ostalb gab es ab und an Einzelkämpfer, jedoch ohne Verbindung untereinander, mehr war aber nicht. Die Initialzündung kam mit Hermann Behrmanns *Testo kvin mil*, der auch in Aalen Anklang fand.

Wie sich in Aalen vor 45 Jahren dies zarte Pflänzlein regte, als einige Interessierte begannen Esperanto zu lernen, da kam Siegfried Schlumberger ins Spiel, der sich – selbstlos wie er war – gleich darum kümmerte. An der Volkshochschule begann eine Selbstlerngruppe, für deren Durchführung Siegfried Woche für Woche nach Aalen fuhr, um qualifizierten Unterricht zu gewährleisten.

Aus dem Kurs erwuchs bald eine ansehnliche Gruppe, die ihn dann beim Esperanto-Weltkongress in Augsburg 1985 tatkräftig unterstützte, wo er eine tragende Rolle hatte, als *kongresejstro*.

Seine vielfältigen Kontakte in der Esperanto-Welt führten dazu, dass die Aalener Gruppe vor der offiziellen Städtepartnerschaft Aalens zu Tatabánya bereits einen gemeinsamen Vertrag unterzeichnete und regelmäßig zu Treffen in diese Partnerstadt fuhr.

Kontakte zu Adolf Burkhardt und der Deutschen Esperanto-Bibliothek in dessen Pfarrhaus Bissingen/Teck wurden intensiviert und resultierten darin, dass nach Adolfs Pensionierung diese bedeutende Sammlung ein neues Heim in Aalen finden konnte.

Parallel hatte man sich regelmäßig mit Franz Alois Meiners getroffen, dem die Atmosphäre in Aalen zusagte, so dass er sein Wohnmobil immer häufiger hierher steuerte. Das weitere ist Geschichte und sollte bekannt sein: FAME-Stiftung und Aalener Esperanto-Kulturpreis.

So bleibt uns nur diese Verneigung in Ehrfurcht und aufrichtiger Trauer um einen langjährigen Freund und Mitstreiter. Forlasis nin amiko vera, instruisto fidela, Esperantisto modela:

Kara Siegfried, ripozu kaj restu vi en paco eterna!



Utho Maier

UK en Tanzanio – kelkaj impresoj

La unua UK en Afriko. Neniam mi vizitis tiun parton de la mondo. Multekosta vojaĝo, komplika preparado (vizo, vakcinoj, profilakso – tamen mi decidis ke mi jes ja partoprenos. Kaj neniel mi bedaŭris tiun decidon.

Kune kun Isabelle kaj Pierre el la ĉirkaŭaĵo de Limoges mi ekflugis de Parizo ĝis Nairobi, kie ni devis atendi nokton antaŭ ol flugi al Aruŝo, nia celo. Maltrafo de tiu flugo kaŭzis al ni plian noktan restadon en la flughaveno, kiu finfine tute ne gravis, ĉar ni havis ĉie agrablajn interparoladojn kun dungitoj, (purigistoj, kelneroj) de la flughaveno kaj aliaj pasaĝeroj. Mi aparte ĝojis havi multajn eblecojn uzi la kisvahilan lingvon, kiun mi estis eklerninta en Germanio.

Tre simpatian travivaĵon ni havis de la unua tago en Aruŝo. Jam antaŭ la antaŭkongreso ni amikiĝis kun lokano, volontulo en la naturhistoria muzeo. Li pretis nin gvidi tra la urbo kaj respondi al niaj demandoj pri la ĉiutaga vivo en Tanzanio. Kaj post la UK ni kun li kaj lia familio ekskursis kune al belega lago apud Aruŝo. Li eĉ akompanis nin al la flughaveno por nin adiaŭi la lastan tagon! Eble li eĉ eklernos Esperanton.

La antaŭkongreso ebligis la viziton de diversaj naciaj parkoj (Ngorongoro, Tarangire, Lago Manjara). Belegis la pejzaĝo, la savano: videblis baobab-arboj, afrikaj akacioj, multaj aliaj arboj kaj arbustoj, kies nomoj kaj kuracajn ecojn mi nur tiam eksciis. Kaj kian mirindan faŭnon ni povis spekti: elefantojn, ĝirafojn, zebrojn, bubalojn, rinocerojn, leonojn, flamengojn, pelikanojn kaj aliajn specojn, ofte belege multkolorajn birdojn kaj papiliojn.

Danke al tiuj vidindaĵoj naturaj, sed ankaŭ danke al la simpatiega grupo esperantista (italaj, francaj, britaj kaj germanaj samideanoj partoprenis), la sprita, humuroplena, parolema kaj informema tanzania ŝoforo kaj la kompetentege kaj nelacegeble tradukanta Michael Boris,



Maria kun afrikaj esperantistoj.

jam tiuj kvar tagoj de la antaŭkongreso indus la kompletan elspezon kaj la vojaĝpreparadojn.

Kaj ni dum tiuj tagoj ankaŭ havis la okazon konatiĝi kun anoj de triboj: masajoj kaj hadzabeoj (la t.n. buŝmanoj de Orienta Afriko). Estis interesa renkonto. Aliflanke levigis demandoj: Ĉu la triboj vere konsentas pri ilia integriĝo al la turisma industrio? Kiom da gajnas la tanzania ŝtato, kiom da gajnas ili?

La UK, kiu sekvis, estis unika. Partoprenis multaj junaj afrikaj geesperantistoj ĉefe el Tanzanio, Kongo DR kaj Burundo. Por multaj el ili ĝi estis la unua internacia Esperanto-kongreso. Kiom entuziasmplenaj, komunikemaj kaj kontaktemaj ili estis! Mi emis pensi, ke la plej forta, agema Esperanto-movado estas tiu en Afriko. La entuziasmo de la gejunuloj memorigis min forte pri miaj unuaj partoprenoj en internaciaj aranĝoj, kiam mi, adoleskulino, faris miajn unuajn hezitajn paŝojn en la internacia lingvo kun internacia samideanaro. Ofte interesaj interparoladoj decidigis min rezigni pri planata ĉeesto en ia oficiala programero.

Kiel kutime la programo enhavis aŭskultindajn prelegojn: Pri afrikaj lingvoj, afrika kulturo, pri malario, pri astrofiziko kaj pri masajaj triboj (tribanoj kaj eĉ tribestroj masajaj nin vizitis).

Laborkunsidoj okazis, aparte vizitindis tiu de Ateista Tutmonda Esperanto-Organizo (ATEO).

Kaj jes ja, oni ankaŭ traktis iom la historion de afrika landoj. Tamen ne en tre kritika maniero, sed iom tro surface, sen vere partoprenigi afrikanojn, kiuj ja multe suferis pro eŭropa koloniismo kaj ankoraŭ suferas pro

postkoloniismo – en Tanzanio aparte fie kondukis la germanoj. Eble estonte oni invitus historiiston kritikan, kiu, eĉ se ne temos pri esperantisto, povus helpe de tradukisto pli kompetente informi kaj diskutigi.

Resume mi devas konfesi, ke la 109-a UK en Tanzanio estis la plej bela, interesa kaj riĉiga UK, kiun mi iam spertis dum mia esperantista vivo, kiu jam daŭras 51 jarojn. Bedaŭras mi, ke mi ne jam antaŭ jardekoj vizitis Tanzanion kaj nur nun konatiĝis kun tiom da agrablaj homoj.

Maria Merla



Maria ĉe la masajoj.

Pola E-Kongreso – preskaŭ sen germanoj

„Esperanto superas landlimojn“, ni ofte diras. Kiam do okazas Esperanta kongreso en la pola urbo Kalisz, atingebla en apenaŭ 5 horoj de Berlino per trajno aŭ aŭto, oni eble povus atendi, ke ĝi allogas ankaŭ multajn germanojn.



Des pli mi miris, ke mi estis la sola germano sen pola deveno inter la preskaŭ 160 partoprenantoj de la ĉi-jara Pola Esperanto-Kongreso. Mian surprizon malpliigis nur la fakto, ke mi estis la ununura germano jam ĉi-printempe en la Esperantaj Tagoj de Krakovo.

La kongreso okazis de la 17-a ĝis la 21-a de Julio kun partoprenantoj el 9 landoj, plejparte poloj, sed ankaŭ 11 francoj. Ĝi estis verŝajne la plej granda Pola Kongreso post la ŝanĝoj de 1989. Kaj ĝi estis aparte sukcesa el ĉiuj vidpunktoj: bonega etoso, interesaj ekskursoj, alloga urbo, bonega vetero, inspiraj prelegoj kaj bonegaj manĝoj, ĉio ĉi je, el germana vidpunkto, mirige malaltaj prezoj. Ni pagis ekzemple nur 11,60 € por tranokto en komforta dulita ĉambro kaj 5,80 € por bonega tagmanĝo. La kongresa nomŝildo validis kiel urba busbileto.

La bonega etoson ni dankas nelaste al niaj muzikistoj: La simpatia duopo Kajto, Ankie kaj Nanne, entuziasmigis kaj dancigis nin ĉiuvespere per siaj jen amuzaj, jen pensigaj kantoj. Abundis inter ni ankaŭ polaj muzikistoj, el kiuj mi ŝatus aparte menci i Maciej Fortuna kaj lian ensemblon, Aleksanda kaj Julia Czajka (piano) kaj Wojtek Ławnikowicz kaj Jerzy Stefański (kantado kun gitaro aŭ ukulelo).

La aranĝo komenciĝis per tuttaga ekskurso al Gołuchów kaj ties renesanca kastelo, en kiu ni povis admiri valorajn

artaĵojn el diversaj epokoj. Vespere sekvis pikniko sur herbejo de la universitata kampuso – belega pro vetero, muziko kaj danacado.

Ekde la inaŭguro en la vendreda mateno ni traktis la kongresan temon „Kalisz – atestanto pri tempoj, fonto de scio kaj memoro“. Oni elektis tiun temon certe por akiri pli facile subtenon de la urbo. Sed rapide mi konstatis, ke tiu temo devas tuŝi ne nur polojn, sed aparte min, ĉar la ĉefaj kulpuloj pri la tragedia sorto de la urbo Kalisz ja estis germanoj. Estis germanoj, kiuj preskaŭ plene detruis la urbon jam komence de la Unua Mondmilito en Aŭgusto 1914, kaj kiuj forpelis polojn kaj deportadis la grandan judan komunumon de Kalisz dum Dua Mondmilito.

La aranĝo estis plena je ĝojo kaj kortuŝo. Menciindas, ke iuj el la ŝatataj „steluloj“ de nia aranĝo, kiuj pliriĉigis la kongreson per muziko aŭ danco, estis handikapuloj. Esperanto do utilis almenaŭ por superi limojn inter handikapitaj kaj nehandikapitaj homoj. Aparte kortuŝa estis la momento, kiam en programero pri Ŝoaho la prelegantino tiel emociiĝis, ke ŝi devis peti amikon daŭrigi la laŭtleĝadon de ŝia manuskripto. Ŝi trovis ĉies komprenon, ĉar temis pri la deportado de ŝia avino al koncentrejo.

Apenaŭ eblas diri ion negativan pri la kongreso. Krokodilado ne malabundis, sed apenaŭ ĝenis, ĉar en ĉeesto de iuj el la 20 eksterlandanoj la poloj kutime ŝanĝis la lingvon al Esperanto. Kaj facilis havi ĉiam ĉirkaŭ si geamikojn, kun kiuj eblis tre bone interparoli en Esperanto.

Eblas ankoraŭ menci diversajn sukcesajn programerojn, ekzemple la prelegon de Jolanta Chrustowicz pro komunajoj inter Ludoviko Zamenhof kaj John Lennon (pri kies koncepta lando Nutopio mi aŭdis unuafoje en tiu prelego), kaj la urbogvidadon, kiun ni finis per plantado de esperanta arbo. Per senvualigo de la koncerna memorŝtono, ni ekhavis novan ZEO-n en Kalisz.

Restas en mia memoro multaj belegaj momentoj – kaj belegaj kantoj, kiel ekzemple „Mi volas danki vin, sinjoro Ludoviko...“. Vere mi sentas en mi profundan dankemon al Zamenhof – sed ankaŭ al ĉiuj organizantoj kaj kontribuantoj de tiu ĉi mirinde bela kongreso.

Ulrich Matthias



Medienecho

Leider gibt es immer mehr Netzbeiträge, die nur über Angabe persönlicher Daten, per Passwort, kostenpflichtig oder nach Anmeldung zu lesen sind.

Auf nicht im Netz erschienene Berichte, die aber vorliegen, wird hingewiesen. Diese können Interessenten gerne als Kopie zum persönlichen Gebrauch (nur per Netzpost) zugesandt werden. Anfragen an medienecho@esperanto.de – Bitte den jeweils genannten Betreff angeben.

12. September 2024

Georg Rosenbaum

Am vergangenen Dienstag begann mein zweiter Esperanto Kursus, auch dieses Mal über das Internet mit der Videoplattform Zoom. Er wird vom Londoner Esperanto Klub angeboten. Es nehmen ca. 15 Leute daran teil, darunter Amerikaner, Brasilianer, Polen, Engländer, Deutsche und meine Wenigkeit. Der gesamte Kurs findet nur in der Sprache Esperanto statt.

<https://georg-rosenbaum.de/2024/09/12/mein-zweiter-esperanto-kursus-begann-mia-dua-esperanto-kursu-komencigis/>



3. September 2024

Aachener Zeitung

Museum für zeitgenössische Kunst in Eupen
Die Künstlerin stellt ihr neues Projekt „Entre les lignes“ vor, das mit der Region ganz im Osten Belgiens viel zu tun hat: vor allem mit der Geschichte Neutral-Moresnets und der erfundenen Plansprache Esperanto.

<https://www.aachener-zeitung.de/freizeit/event/4449491.html?location=5f1859a53d65a16a754594cb&date=20240825&event=669d97682a1703011c053915>



2. September 2024

Eichsfelder Nachrichten/ Nordthüringer Nachrichten Exkursion nach Herzberg am Harz

Am Donnerstag, den 05.09. lud die Urania Bildungsgesellschaft Eichsfeld zu einer Exkursion nach Herzberg am Harz ein. Die Führung während der



Veranstaltung übernahm Frau Zsofia Korody (Vorsitzende des Verbandes deutscher Esperanto-Lehrer).

https://www.eichsfelder-nachrichten.de/news/news_lang.php?ArtNr=352466

https://www.nordthueringen.de/news/news_lang.php?ArtNr=352466

16. August 2024

MSN

Konstruierte Sprachen: Sie sollen für alle da sein

Die Sprache ist zweifellos eines der wichtigsten Instrumente des Menschen. Ohne sie wären wir nicht in der Lage zu kommunizieren, zu kooperieren, ...

<https://www.msn.com/de-at/nachrichten/other/konstruierte-sprachen-sie-sollen-f%C3%BCr-alle-da-sein/ss-BB1pQG7p#image=1>



15. August 2024

WDR

Esperanto

Dokumentarisches Hörspiel über eine Gruppe von Freiwilligen in einem griechischen Flüchtlingslager. Darüber, sich mit der Welt abzufinden, wie sie ist, und gegen Windmühlen zu kämpfen - zwischen Idealismus und Pragmatismus.

<https://www1.wdr.de/radio/wdr5/sendungen/hoerspiel-am-sonntag/esperanto-100.html>



30. Juli 2024

Anfrage an das Bundesministerium für Bildung und Forschung

„Spenden und Vererben zum Nutzen der Esperanto-Bewegung“ Beratungsgespräche anbiete. Diese können auf unseren Veranstaltungen wie dem Verbandsrat oder dem GEK stattfinden, wobei strenge Vertraulichkeit zugesichert wird. Falls Sie aber durch hohes Alter oder Gebrechlichkeit am Reisen gehindert sind, ist es auch möglich, dass ich Sie in Ihrem Zuhause besuche. Treten Sie einfach per Email oder Telefon an mich heran: s.a.emmerich@gmx.de oder 0175-4025268.

Andreas Emmerich

Keine gescheiterten Projekte

Leserbrief zu "Perspektiven für die Zukunft der Esperanto-Bewegung in Deutschland", Esperanto aktuell 4/2024, S. 21ff.

Den verdienstvollen Erwägungen von Andreas Emmerich zu den Perspektiven der deutschen Esperanto-Bewegung mag man zustimmen und viel Erfolg wünschen, aber zu den von ihm genannten "gescheiterten" Projekten von Esperanto-Häusern möchte ich doch einiges richtigstellen:

Das Ende des Esperanto-Zentrums Paderborn wurde von seinem privaten Betreiber Hermann Behrmann bewusst so entschieden, und das gegen das Angebot des D.E.B.-Vorstands, es nach seinem Rückzug zu übernehmen. Also kein gescheitertes Projekt des D.E.B.

Das Berliner Büro (BerO) in der Einbecker Straße ist ebenfalls nicht gescheitert, sondern vom D.E.B.-Vorstand durch den plötzlichen Entschluss, in die Katzbachstraße umzuziehen, "gescheitert worden" (Genaueres s. Esperanto aktuell 4/2014, S. 20f). Dem nachfolgenden Vorstand machte ich seinerzeit den Vorschlag, selbst die Wohnung zu kaufen und (günstiger als in der Katzbachstraße) an den D.E.B. zu vermieten. Zur laufenden Unterhaltung stand die Familie-Fischer-Stiftung zur Verfügung, deren Zielsetzung seitdem zur Hälfte ins Leere geht. Im Hinterkopf hatte ich natürlich (ähnlich wie Johann Pachter), den D.E.B. am Ende bei meinem Erbe zu berücksichtigen. Als Echo bekam ich nur die mündliche Mitteilung, der Vorstand habe mein Angebot abgelehnt. Also alles für die Katz(bachstraße). **Rudolf Fischer**

Karaj legantoj de GEJ-Gazeto,

denove pasis somero, do tio signifas, ke denove ĵus pasis Internacia Junulara Kongreso (IJK)! Ĉi-foje la IJK okazis en Ŝventoji, Litovio, kaj ĝin partoprenis ankaŭ kelkaj GEJ-aktivuloj. Du el ili, Ana Ribeiro kaj Utku Özdemir, raportas en tiu ĉi eldono pri siaj spertoj kaj impresoj antaŭ kaj dum la litova IJK.

Ke pasis somero, ankaŭ signifas, ke jam alvenis aŭtuno kaj baldaŭ alvenos vintro: En vintro, precipe en Decembro, kiel kutime okazos la ĉiujara membroasembleo de nia asocio, Germana Esperanto-Junularo (GEJ). Bonvolu trovi pli sube la oficialan, germanlingvan inviton al ĝi, kiu ankaŭ enhavas informojn pri kiel kaj kie vi povas partopreni la asembleon. Dum la asembleo, ni interalie elektos novan estraron por la sekvaj du jaroj. Se vi estas membro, nepre pripensu do, ĉu interesas vin aliĝi al nia teamo kaj tiel kune antaŭenigi la agadon de GEJ en la proksima estonteco. Se vi volas legi pli, estas tri pliaj artikoloj en la gazeto, verkita de diversaj junuloj: Unue, Lucía Fernández el Katalunio iomete

priskribas sian Erasmus-studinterŝanĝon en Karlsruhe kaj kiel ŝi sentis sin bonvenigita en la loka Esperanto-komunumo dume. Due, Paul Widzowski rakontas al vi personan sperton el la interesa fako de eksperimenta arkeologio: Li remis sur rekonstruita romia rivermilitŝipo! Trie, Meriko Seidel prezentas eseon pri la filozofio de F. A. Hayek, specife ties pensoj rilate al la ofte diskutata temo de socia justeco.

Kaj fine, vi eble memoras, ke en la pasinta eldono aperis la unua parto de taglibro skribita de mi (Michael Vrazitulis, unu el la redakcianoj) dum mia partopreno en la Esperanta televidserio „Esperanto Senlime“ en somero de 2023. La duan parton, kiu daŭrigas la rakonton, vi nun trovas en tiu ĉi eldono. Plej laste, Christine Brücker provizas al vi kelkajn tutfreŝajn informojn pri JES 2024/'25 en Belgio, ekzemple pri speciala koncerto, kiu okazos tie! Ni deziras al vi agrablan legadon!

Michael Vrazitulis kaj Paula Weil,
por redakcio de GEJ-Gazeto.



Komuna foto dum IJK 2024 en Ŝventoji, Litovio (18–25 Aŭgusto).

IJK 2024: Pli multe da ekskursoj ol dum averaĝa IJK

La ĉi-jara IJK en Litovio estis mia tria ĉeesta IJK. Por mi estis multaj memorindaj momentoj dum ĝi, sed ankaŭ antaŭ ĝi. Mi kaj sep aliaj kongresanoj vojaĝis de Kiel, Germanio al Klaipėda, Litovio, per pramŝipo. Do, iusence okazis eta, neoficiala antaŭkongreso, kiu ne sentiĝis kiel laciga vojaĝo, sed trankvila, freŝiga ferio. Danke al la tre detale pretigitaj instrukcioj donitaj de la organizteamo (kaj danke al ilia ĉiama elkora helpemo), eblis atingi la kongresejon sufiĉe senprobleme kaj dum la kongreso ne estis rimarkeblaj problemoj. Krom malmultaj pluvaj/nubaj tagoj, estis malvarmeta, sed somera etoso. Tio estis aparte



oportuna por ekskursemuloj, ĉar dum la litova IJK okazis pli multe da ekskursoj ol dum averaĝa IJK. Dum kongresa ekskurso, mi marŝante malkovris litovajn vilaĝojn kaj kajakumis sur litova rivero. Kun grupeto ni faris aldonan neoficialan ekskurson al la latva landlimo, kiu situas nur kvin kilometrojn for

de la kongresejo. Miaopinie, la naturo de Litovio vere estas vidinda, kaj mi ĝojas, ke mi povis uzi mian tempon por ĝui la pejzaĝojn kaj la fajnsablajn plaĝojn. Kiel kutime dum Esperanto-kongresoj, denove estis bona oportuno renkontiĝi kun konataj karaj geamikoj, sed ankaŭ ekkoni novajn. Okazis koncertoj, prelegoj, atelieroj, danckursoj ... Aldone menciindas, ke la manĝoj estis elektitaj por reprezenti la litovan manĝkulturon. Dum la semajno ni gustumis kaj tiel lernis multe pri ĝi. Resume, estis tre agraba kaj (laŭ mi) sukcesa IJK. Mi dankegas al la organizintoj kaj esperas estontece reviziti Litovion por malkovri pli. **Utku Özdemir**



Litova rivero, vizitita dum ekskurso.



Gustumante tradicionan malvarman litovan supon Šaltibarščiai.

IJK 2024: Sukcesa kongreso kun agrabla etoso

“Antaŭkongreso” sur la maro

Por mi la IJK komenciĝis antaŭ ol ĝia komenco, ĉar mi decidis kun tri aliaj kuniri al IJK per ŝipo, el Kiel al Klaipėda. En Berlino (kie mi loĝas kaj komencis vojaĝi), mi renkontiĝis kun du el miaj kunvojaĝantoj, kaj ni iris al Kiel (mi kaj Utku per regionaj trajnoj kaj Sofia per buso). Jam en Kiel dum la tago ni iom ekskursis kaj vidis la ĉirkaŭaĵon de la urbo.

Vespere, enirante en la ŝipon, ni retrovis aliajn esperantistojn, kiuj decidis vojaĝi same al IJK kaj tie ni estis entute ok (unu decidis ne aperi sur la foto). La vojaĝo per ŝipo daŭris ĉirkaŭ 24 horojn, do tiel ni havis ian etan

neformalan „antaŭkongreson“ sur la maro, ni babilis, ludis ludojn, manĝis kune kaj ĝuis la etoson.

Alveno en Ŝventoji en granda stilo

La ŝipo alvenis al Klaipėda iom pli malfrue ol atendite, tiel ni ne sukcesis trafi la lastan buson al Ŝventoji. Tiel, ni devis trovi solvon kiel alveni al Ŝventoji. Nia okkapa grupo dividiĝis en tri partojn, unu (Lars) iris per biciklo, tri homoj iris per tute ordinara taksio. Mi mendis grandan taksion por iri kvarope al Ŝventoji.

Ni havis grandan surprizon, kiam tiu taksio alvenis kaj ĝi estis tute ordinara taksio, sed iu por-festa taksio. Ni kvarope havis duonhoran amuziĝon en nia vojaĝo al Ŝventoji.

Kongresejo

Bedaŭrinde, la kongresejo ne estis la plej luksa kongresejo. Ĝi estis en tre malnova konstruaĵo (konstruita ankoraŭ en la sovetunia tempo) kaj estis nur tri aŭ kvar publikaj necesejoj (en ne tre pura stato) por ĉiuj partoprenantoj. Ankaŭ estis ege multaj araneoj, kaj por mi ili estis terurigaj. Ankaŭ estis kelkaj reguloj, kiuj ne sencis al mi, ekzemple: ne eblas duŝiĝi post la 20-a horo aŭ antaŭ la 8-a. Tamen la dometoj tie estis ĉarmaj.

La kongresejo estis ĉe la maro, sed mi lernis ĉi-jare ke la Balta Maro estas pli malvarma, ol mi persone povas elteni, kaj mi ne tiom ĝuis tion. Kelkaj homoj tamen naĝis kaj amuziĝis.



Antaŭkongresanoj esploras la urbon Kiel.



Ligna loĝdometo en la IJK-kongresejo.

Taga programo

Preskaŭ ĉiutage mi endormiĝis ĉirkaŭ la 2-a matene, tio signifis, ke mi maltrafis la matenan programon kaj iris rekte al la posttagmeza. Tamen, mi memoras pri kelkaj mojosaj programeroj en la taga (posttagmeza) programo, ekzemple: prelego pri Drag-kulturo de Demlin, ateliero pri aŭtentika rilatado de Manuela, modela UN kun Ikvero, aŭkcioj de libroj kun Severija, ŝakturniro organizita de Geomar. Entute, mi tute ĝuis la programerojn, kiujn mi partoprenis!

Vespera programo

Estis koncertoj ĉiutage en la IJK, ne ĉiuj plaĉis al mi (la unua litova grupo, kiu ludis, ne estis mia plej ŝatata stilo), sed kelkaj plaĉegis. Mi treege ŝatis, kiam venis litova grupo kaj ne nur muzikumis, sed ankaŭ instruis kiel danci kelkajn tradiciajn litovajn dancojn. Mi ankaŭ tre ŝatis la pli trankvilan koncerton de ĴeLe kaj ankaŭ de Martin Wiese, Bertilo kaj Birke, kaj aliaj.



Michaela kaj mi dum pluveta ekskurso:
En la fono videblas Kaliningrado (Rusio).



Prelego pri Drag-kulturo.

Krom koncertoj, estis karaokeo, Drag-prezentaĵo, trinkomanga nokto, kaj – maltrafite de mi (mi jam foriris) – internacia vespero. Krome la etoso en la gufujoj kaj drinkejoj ĉiam estis tre bona laŭ mi, malgraŭ ke en Litovio estas kelkaj pli striktaj reguloj pri alkoholo.

Ekskursoj

Mi persone iris nur al unu ekskurso, malgraŭ ke mi aliĝis al du. Mi rezignis pri la dua pro la malbona veterprognozo (mi ne portis tiom da varmaj vestaĵoj, kaj mi iom pentis pri tio – estis la plej malvarma IJK, kiun mi spertis), sed la unua kaj sola ekskurso, kiun mi partoprenis, estis belega. Mi vizitis la Kurŝi-terlangon, kie estis tre bela naturo. Ni multe promenis tie, kaj ni iris ĝis proksimume al Nida, kiu estas tuj apud al la landlimo kun Rusio (oblasto de Kaliningrado) – kompreneble ni ne trapasis tiun landlimon. Ni ankaŭ rapide vizitis la feridomon de la germana verkisto Thomas Mann.



La iama feridomo de Thomas Mann.

Konkludo

Malgraŭ kelkaj ne tiom bonaj aferoj (malbona vetero kaj ne tiom bona kongresejo), la kongreso estis entute tre sukcesa, ĉarma kaj ĝuebla! Mi tre ĝojas, ke mi iris! Estis tre agrabla etoso.

Ana Ribeiro



Tradicia litova muzikgrupo koncertas dum IJK.

Einladung zur DEJ-Mitgliederversammlung 2024

Deutsche Esperanto-Jugend e. V.
Katzbachstraße 25

Berlin, den 16.09.2024

Hallo liebes Mitglied,

hiermit möchten wir dich ganz herzlich einladen zur Mitgliederversammlung der Deutschen Esperanto-Jugend e. V.

Diese findet am 30.12.2024 um 11:00 Uhr sowohl online über Zoom (Meeting-ID: 662 2189 8489, Passwort: 04644627) als auch in Belgien in der Herberge „Bernardfagne“ (All. de Bernardfagne 7, 4190 Ferrières, Belgien) im Rahmen der Veranstaltung JES 2024/'25 (mehr Infos unter <https://verdajskoltoj.net/es/jes-24-25/>) statt, also hybrid.

Dabei erwarten dich die folgenden spannenden Punkte:

TOP 1: Eröffnung; Wahl von Versammlungsleitung, Wahlleitung und Protokollführung; Feststellung der Stimmberechtigung; Ergänzungswahl

TOP 2: Abstimmung über die Tagesordnung

TOP 3: Vorstands- und Kassenbericht mit anschließender Diskussion

TOP 4: Bericht der Kassenprüfer:innen

TOP 5: Entlastung des Bundesvorstandes

TOP 6: Wahl des Bundesvorstandes und der Kassenprüfer:innen

TOP 7: Bericht der Arbeitsgruppen

TOP 8: Arbeitsplan und Haushalt für das kommende Jahr, Wahl von Ausschüssen

TOP 9: Verschiedenes

TOP 10: Entscheidung über Ort und Datum der nächsten Mitgliederversammlung

TOP 11: Schließung der Sitzung

Wenn du aktiv werden willst um im Verein etwas zu bewegen, werde Mitglied eines Ausschusses, der dein Interessengebiet vertritt (TOP 8).

Oder hast du Lust, den Vorstand gewählt zu werden (TOP 6), weißt aber nicht, was da so auf dich zukommt? Kein Problem, melde dich einfach bei Michael (michael.vrazitulis@esperanto.de), um mehr zu erfahren.

Es freuen sich auf dich

Michael, Ana, Lino, Viktoria, Paula, Meriko, Oda
Dein DEJ-Vorstand

Mia sperto kun la esperantista komunumo dum Erasmus en Germanio

La pasintan jaron mi faris mian Erasmus en Karlsruhe, kaj, kiel ĉiam kiam oni komencas novan vivetapon, mi havis iom da timo kaj nervozeco pri kiel estos vivi tutan jaron en nova lando, kun malsama lingvo kaj kulturo, kaj ankaŭ pri la defio konatiĝi kun novaj homoj. Mi havis la bonŝancon esti inkluzivita en la Telegrama babilgrupo de GEJ danke al esperantistino, kiu memoris, ke mi faras Erasmus tie, kaj danke al tio mi povis scii, kiaj kunvenoj okazas en Germanio dum tiuj monatoj.

Membro de la babilejo informis min pri iuj monataj vespermanĝoj organizitaj de la esperantista grupo de Karlsruhe. Bedaŭrinde, pro la okupata horaro de Erasmus-studento en siaj 20-aj jaroj, mi nur povis partopreni unu vespermanĝon, sed ĝi estis vere amuza kaj interesa. Mi povis renkonti novajn homojn, kaj krome mi lernis pri tradicioj kaj kuriozaĵoj de la regiono, same kiel pri iuj manĝaĵoj kaj ankaŭ pri kelkaj libroj.

Alia esperantistino, kiu ne loĝis tre malproksime, afable gastigis min en sia domo, donante al mi la eblon viziti novajn kristnaskajn bazarojn (la granda turisma allogaĵo por ni, kiuj venas el la sudo, por forgesi la mankon de suno) kaj ankaŭ renkonti novajn homojn.

Ĝenerale, esti parto de la GEJ-grupo kaj ekscii pri la diversaj renkontiĝoj kaj agadoj, kiujn ili organizas, sendepende de ĉu mi povis partopreni aŭ ne, donis al mi tiun nekredoblan senton de esti parto de komunumo. Mi vere rekomendas konektiĝi al la esperantista reto kien ajn vi iras kaj pasigi bonajn momentojn kun samideanoj.

Lucía Fernández – Katalunio

Ĉu vi iam remis Romie? – La antikva remŝipo sur la Rejno

La elŝipejo de la *Lusoria Rhenana* estas for de la fervojo, do la unua aventuro por kelkaj estas la alvojaĝo: aŭte ĝi estas ne tro malfacile (sekvu la aŭtostradon ĝis Speyer kaj poste la L549), sed se vi estas pli aventuremaj eblus trajnvojaĝi ĝis Rheinzabern kaj migradi aŭ bicikli la restantaj kvar kilometrojn. La rezulto de la alvojaĝo tial ankaŭ videblis en la vizaĝoj de miaj kunremantoj.

Iom post iom alvenis la kunremantoj: tiuj kun klimatizilo freŝaj kaj viglaj, tiuj kun biciklo ne tiom. Tio tamen baldaŭ egaligos, ĉar post kiam mi rekonis la sunŝmirajitajn kaj nekutime vestitajn homojn kiel miajn amikojn kaj kunstudantojn, la ŝipestro (*magister navis*) apud la enŝipejo – remizo apud draglaĝeto, kie ni jam vidis la lignan ŝipeton – nin vide ekzamenis. La taktisto, kiu indiku al la aliaj

la tempon de la remado, estu malgranda kaj espereble muzikema viro. Tiu sorto trafis min. Ankaŭ la aliaj estis asignitaj siajn sidlokojn sur la ŝipo laŭ korpa grandeco kaj forteco, por ke la ŝipo havu la saman rapidecon ambaŭflanke.

Post kiam ni fiksas niajn pezajn lignajn remojn kaj post komenca malklaro de sudgermanaj „teroratoj“, kiu estas tribordo (Steuerbord) kaj babordo (Backbord), ni sukcesis debordiĝi – kaj post malmultaj remobatoj jam paŭzis. Ni fakte pli paŭzis ol remis dum la du horoj surŝipe, pro la varma vetero. Ĉar remi en komuna takto ankoraŭ estas malfacile (neeble, ke ĝi estus pro la taktgvidanto!), niaj remiloj foje kruciĝis kaj hokiĝis. Por eviti pliajn koliziojn, la ŝipestro proponis, ke ni subtenu nin per muziko. La elekto falis sur tradicie romia kanto: ACDC. La tago finiĝas – iom elĉerpate, sed nun kun scio de manovroj kiel la „haosa turniĝo“ – en proksima gastejo.

La *Lusoria Rhenana* estas la impona rezulto de eksperimenta arkeologia metiarto. La ŝipo estas laŭoriginala rekonstruaĵo de romia rivermilitŝipo de la malfrua antikvo, kiu tiam ankaŭ estis uzata sur la Rejno por defendi sin kontraŭ la ĝermanoj.

Arkeologie, ĉi tiu ŝipotipo estis konata jam ekde la 1980-aj jaroj pro la trovo de tri romiaj ŝipruinoj en Mainz. La iniciintoj akiris la kunlaboron de fakuloj de la Universitato de Trier por la komuna projekto. La sekcio „Eksperimenta Arkeologio“ de la Universitato de Trier jam sukcese plenumis du aliajn romiajn ŝiprojektojn kaj

eksperimentis pri la romia rivernavigado. El la analizoj de la majencaj romiaj ŝipoj rezultis la dimensioj kaj specifoj por la originala rekonstruaĵo de la Lusoria Rhenana. Kun helpo de la distrikto Germersheim, la rekonstruaĵo estis realigita en 2010 ene de dek monatoj kun partopreno de multaj volontuloj, kiuj formis ĉirkaŭ 5 tunojn da kverkoligno en ŝipon. Sur la Lusoria Rhenana estas loko por 24 remistoj, po dek du homoj ĉe ambaŭ flankoj. La ŝipripo estis tute konstruita el kverkoligno. Kilo kaj bretoj estas kuntenataj per miloj da mane forĝitaj feraj najloj. Dum sciencaj testveturoj, kun lerta remistaro, la rapideco atingis ĉirkaŭ 8 km/h kun uzo de 20 kvadratajn metrojn granda velo.

Ĉiumonate je la unua dimanĉo je 16h30 okazas publikaj veturoj por individuoj kaj malgrandaj grupoj. La rezervado kaj eldonado de la „veturbilettoj“ okazas ĉe la komunumo Neupotz. Por pli grandaj grupoj kun minimume 12 partoprenantoj oni kontakti la klubon (rete: lusoriarhenana.de).

Paul Widzowski

Socia justeco laŭ F. A. Hayek

„Ĉu ekzistas socia justeco?“

Ĉu vi antaŭe demandis tion al vi mem? Aŭ al alia persono? Eble vi ankaŭ demandis tion mense al la tuta mondo.

Ankaŭ Friedrich August von Hayek – filozofo, kiu naskiĝis en 1899 kaj mortis en 1992 – pensadis pri tiu afero. Li ankaŭ kontemplis pri la temo de socia justeco kaj ĉu eblas realigi tiun justecon en la mondo.

Liaj vidpunktoj kaj opinioj

Laŭ Hayek, ekzistas granda problemo: Kiu estas *justeco*? Kion signifas tiu koncepto?

Ja ekzistas difino en vortaro, sed laŭ Hayek ĉiu homo sentas, ke aliaj aferoj estas justaj. Ĉu iu kredas, ke io ajn estas justa, dependas de diversaj faktoroj; ekz. vidpunktoj, socia pozicio ktp. Kaj pro tio ne eblas proponi ĉiam-ĝustan difinon por la vorto – la koncepto – de *justeco*. Kaj pro tiu malkapablo Hayek opinias, ke ne estas valora celo strebi al tiu nedifinata koncepto:

„Kio estas ‚socia justeco‘? [...] Justeco estas gravega, se ĝi enhavas ag-regulojn por la individua persono mem. Ja eblas agi juste aŭ maljuste. Sed aferojn kiel distribuon de enspezoj ne eblas reguligi pere de ag-maniero kiuj celas al individua ulo. [...] Sensencas, ke iu persono respondecas pri la distribuo de enspezoj, same kiel se iu persono estus la respondeculo por la san-stato, malsaĝeco aŭ malbelego de aliaj homoj.“

Oni nun povus diri, ke egala distribuo de mono, lando, materialoj ktp. estas justeco, ĉar ĉiu havas la saman. Hayek kontraŭas tion: La justeco per egala distribuo de enspezoj, bienoj ktp. ja antingeblas. Sed li ankaŭ diras, ke tio similus al diktaturo. Pro tio ne indas strebi al tia justeco.

Kontraŭe, li fidis je la forto, je la kontrolo, de la ekonomio.

La libera ekonomio estas la centro kaj plej grava afero, laŭ



Atendante eniri la Lusoria Rhenana ĉe lagobordo.

Hayek. Ĝi reguligas la prezojn pere de ofertoj kaj postuloj. La valoroj de laboroj, materialoj, artaĵoj, krudaĵoj kaj ĉiuj aliaj aferoj fariĝis pro la valoro, kiun la popolo konsideras inda. Tio signifas, ke la popolo mem decidas, kiom kaj kion aferoj valoras – kaŭze de tio, la valoro por la popolo estas la centro de lia pensmaniero. La popolo scias, kio bonas por ĝi. Kaj pro tio ne ekzistas maljusteco por la popolo entute, ĉar alikaze, ĝi agus alimaniere; ĝi valorigus la aĵojn, materialojn, laborojn per malsama altoj.

„Ni [la homaro] eltrovis – ni ne difinis ĝin – ni eltrovis, ke ludi ludon, kiu estas parte ludo de ŝanco, parte ludo de lerteco, estas la plej bona metodo por organizi niajn aferojn. Se ni akceptis la ludon, ĉar ĝi estas efika, ni ne povas diri poste, ke ĝi maljustas. Se neniu friponis, ne ekzistas maljusteco en la ludo. Ĝi ankaŭ ne ekzistas, se oni malvenkas.“

Kritikoj

Sed memkompreneble ankaŭ ekzistas kritikpunktoj, rilate al la opinio de Hayek: Ekzistas sociaj diferencoj inter homoj. Hayek ja konsentas, ke ili ekzistas, sed li nur opinias, ke ili estas naturaj. La problemo malgraŭe daŭras, ke la *ludantoj* en lia ludo ne ekas de la sama punkto. Ne ĉiu persono kapablas atingi la saman nivelon de edukado, de socia pozicio aŭ de mono dum la sama tempo – dum la samaj *lud-raŭndoj*. Kaj lia opinio pri socia justeco ankaŭ ne vere agas iel ajn por kontroli aŭ redukti tiun malegalecon. Laŭ lia teorio, socialaj ekvilibrililoj ne necesas. Sed tiaj iloj eble neprege necesas, se oni konsideras, ke *ne ĉiu ludanto ludas laŭ-regule*.

Fontoj

- Tekstoj / notoj de la lerneja tempo
- Citajoj estas el ĉi tiu dokumentario (komence de 19:25, <https://www.youtube.com/watch?v=52tyPRsL3VQ>): „Inside the Hayek Equation: An Interview with Friedrich von Hayek“

Meriko Seidel



Taglibro de vojaĝ-konkursinto – parto 2

En la lasta GEJ-Gazeto (EA n-ro 286, paĝoj 27–28) aperis la unua parto de taglibro, kiun mi (Michael) skribis dum la tagoj de mia partopreno en la realeca televidserio „Esperanto Senlime“, kiu cetere spekteblas en la YouTube-kanalo „TEJO Esperanto“. La tuta afero okazis en Julio/Aŭgusto de la pasinta jaro 2023.

Memorige, ĉe „Esperanto Senlime“, 8 teamoj konsist- antaj el 17 junuloj el diversaj landoj devis konkurse vojaĝi tra Eŭropo kaj dume filmi sin plenumante diversajn defiojn. Mi mem estis parto de teamo nomita „La Bierknaboj“, kune kun la du pliaj partoprenantoj Lino kaj David.

Ĉi tie do sekvas la dua parto de la rakonto el mia persona perspektivo, kovrante la periodon de la 29-a de Julio ĝis la 1-a de Aŭgusto 2023, do ĝis la antaŭlasta tago de nia vojaĝkonkursanta aventuro...

Sabato, 29-a de Julio 2023

Jen plena tago en Lyon. Okazas urboludo, preparita de Alekĉjo. Sufiĉe varmegas, sed intertempe ankaŭ pluvetas. Ni kiel Bierknaboj restas kune kun la teamo „Gajnontoj“ (Adam kaj Katoo) dum plejparto de la urboludado. Ni iom konfuziĝas kaj pensas, ke la taskoj ricevitaj sur la unua papero disdonita estas jam ĉiuj por la tago, sed fakte estas du pliaj paperoj kun taskoj, kiujn ni devus iri ricevi de la organizantoj. Ni tamen estas en iom trankviluma etoso, do decidas fajfi pri la du pliaj defiaroj. Post ripozoj en katedralo kaj sur hazarda ŝtuparo, ni iam direktiĝas al renkontiĝloko ĉe tiel nomata Dika Ŝtono, kie ĉiuj aliaj jam atendas nin. Ni ricevas tagmanĝon tie de Carlos. Post babiletoj kaj bierumado kune kun Alekĉjo, ni kaj pluraj aliaj teamoj iras al riverbordo, al iu loko, kie eblas bone naĝi. Preterpasas ni ankaŭ iun librinterŝanĝujon, kie mi kunprenas kelkajn diverslingvajn libretojn eklaŭtlegendajn iam poste por defieto nomata „Poligloto“. Do ni, alveninte, iom enriverumas, krom tamen David, kiu forgesis kunporti sian bankostumon. Okazas plaĝa bambumado. Iam ni foriras ĉiuj. Lino kaj mi apartiĝas survoje de la resto, kun celo ie aĉeti bieron (kaj tabakon), kaj do ni duope remarŝas plurajn kilometrojn ĝis la hotelo tra pluveta Lyon. En la hotelo, ni trovas, ke ankoraŭ niaj aliaj kunĉambranoj ne revenis (kaj la ŝlosilon havas Legolas). Do anstataŭ eniri nian ĉambron, ni restas iom en tiu de organizantoj Carlos kaj Auŝrinè. Mi helpas pri lavado de teleroj tie. Ili baldaŭ komencas kuiri vespermanĝon, ankaŭ helpe de Alekĉjo. Iam ĉiuj jam ree estas hotele, do ankaŭ nia ĉambro denove alireblas. Kaj ĉiuj kune vespermanĝas, aŭ en ĉambroj aŭ en hotela koridoro. Estas amuza etoso. Pli poste, ni plubierumas kaj intertempe denove umas en la naĝejo (almenaŭ kelkaj el ni), kie Yentl-Rose, David kaj mi eĉ triope havas grandajn malfacilaĵojn faligi preskaŭ nevenkeblan akvohomturon de Legolas sur

Lino (sed finfine sukcesas). Iam pli tarde, mi telefonas kun mia koramikino. Poste mi ludas kelkajn partiojn de ŝako en la koridoro kun David, Lino, Yentl-Rose kaj Adam. Ni iom finbierumas kaj fine staras dum kelkaj minutoj sube ekstere por (parte) fumi. Adam, Lino kaj mi tie diskutas ankaŭ la estontajn eventorganizajn planojn de PEJ kaj GEJ. Ŝajne ĈAR okazos denove, ĉi-septembre.

Dimanĉo, 30-a de Julio 2023

Ni vojaĝas ĉi-tage al Tuluzo. Ni havas iom da tempo dum trajnŝanĝoj, unue en Avignon, poste en Narbonne, kaj iom ni profitas el tio vizitante la respektivajn lokojn. Precipe en Narbonne, ni prenas buson al proksima plaĝo kune kun aliaj teamoj. Entute ni estas naŭ homoj ĉe la plaĝo. Tie estas fakte ia laguno, tre agrabla. Defio de hodiaŭ estas skribi kantotekston novan por la vojaĝkonkurso temkanzono kaj filmi nin kantante ĝin. Do tiel David, Lino kaj mi faras, ĉeplaĝe kaj kun biero enmane. Ni poste, naĝinte kaj ĉio, havas problemeton, kiam ni provas reveni al la centro de Narbonne per buso: Unu buso preterveturas, ĉar ĝi ne havas sufiĉe da lokoj por ĉiuj ni. Feliĉe la sekva buso tamen lasas nin ĉiujn naŭ eniri. En Tuluzo ni fine trajne alvenas kvaronon antaŭ la deka vespere. De tie, mi pluveturas kun kelkaj aliaj iomete, ĝis mi adiaŭas ilin, ĉar ili restos en aliaj loĝejoj ol mi. Fakte mi sola estos kun afabla tuluzano maljuna, kiu nomiĝas Arno. Li veturas la lastan parton buse kun mi ĝis sia hejmo. Dume, li rakontas al mi iom pri sia interesa familia historio. Li estas franc-germano kaj Esperanta denaskulo. Lia apartamento, kie ni iam alvenas, aspektas iom hipieca. Proponas Arno, ke li dormu surbalkone en hamako, dum mi, la gasto, rajtas dormi en la dormĉambro. Do mi enlitiĝas tie, ĵus sendinte ankoraŭ informojn pri la hodiaŭ plenumitaj defioj al Aŭsrinĉe.

Lundo, 31-a de Julio 2023

Finfine mateno, kiam mi povas plendormi. Mi ellitiĝas preskaŭ je la deka. Feliĉe, mi trovas preparitan matenmanĝon kaj kafon sur la ĉefĉambra tablo, danke al mia bona gastiganto Arno. Do mi konsumas tion, interalie tuj poste prizorgas sendi retrokuplon denove al balkanologia ĵurnalo pri lasta provversio de mia artikolo pri arumana fonetiko kaj baldaŭ eliras el la domo por kapti buson (sekve metroon) por atingi la renkontiĝlokon en parko, kie oni piknikumas, ĉiuj konkursanoj kune kaj ankaŭ kune kun du tuluzaj esperantistoj (krom Arno, iu maljunulino Kati). Fininte la piknikon, ni komencas denove urboludon. Ĉi-foje ĝi okazas per Actionbound, kaj ni devas fari taskojn en diversaj lokoj, sed kun la „twist“, ke la instrukcioj estas ĉiam en hazardaj (ekzotikaj) lingvoj kaj ni ne rajtas uzi maŝintradukilon por kompreni ilin, sed devas kontakti konatojn, kiuj eble konas la lingvon, por helpi nin. Estas sufiĉe amuze, sed ankaŭ iom lacige pro la varmega vetero. Ni plejparte kuniras kun Adam kaj Katoo dum tio. Poste, ni promenas ĝis placo, kie oni renkontiĝas por poste piknikumi en alia parko. Survoje al tiu placo, ni (ĵam nur triope Bierknabe) interalie vizitas iun gravan katedralon kaj iam aŭskultas/kantas „Als ich fortging“ de Karussell tuthazarde.

Post renkonti la aliajn kaj moviĝi kune kun ili al parko, ni do denove manĝas kaj trinkas. Jam estas vespereto. Komenciĝas ankaŭ bierumado. Forirante, fine, de la parko, mi iom parolas kun Jaime pri la arumana, kaj li sufiĉe interesiĝas pri tio. Ni fine alvenas al iu ŝtuparo granda apudrivera, kie eblas bone sidi, neniumi, drinki kaj stultumi. Tuj apude ankaŭ estas ia „Spāti“, kie ni prenas plurfoje pliajn bierojn. Ni estas tie rondo de 10 personoj. Estas sufiĉe amuze. Ni restas tie ĝis meznokto. Poste ĉiu direktiĝas al sia respektiva dormloko. Mi kuniras iom kun tiuj, kiuj tranoktas ĉe Michael Boris, ĉar ni devas preni la saman buson.

Mardo, 1-a de Aŭgsto 2023

Mi vekigiĝas denove ĉe mia tuluzo gastiganto Arno. Post duŝiĝo kaj matenmanĝeto, mi pakas miajn aferojn kaj eliras kune kun Arno por kapti buson ĝis Lardenne, kie proksime ni renkontas la konkursanojn, kiuj tranoktis en apartamento de Michael Boris, krom Emerson kaj Fajro, kiuj jam ekiris pli frue matene. Do ni renkontas tie Lino-n, Katoo kaj Adam-on. Ni kune prenas plue buson, sekve metroon. En iu metrostacio antaŭ la ĉefstacidomo, Arno eliras kaj adiaŭas nin. Ĉe la trajnstacio, ni fakte renkontas ja ankaŭ Emerson kaj Fajro-n, kiuj ŝajne maltrafis antaŭan trajnon. Ankoraŭ ni atendas David, tranoktinta aparte ĉe Marion. Ni kune enrajniĝas jam, feliĉe alvenas ankaŭ David malmultajn minutojn antaŭ ekveturo. Survoje al Barcelono, ni devas ŝanĝi trajnojn dufoje. La aliaj du poloj (Rafaŭ, Adrian) ankaŭ havas la saman itinieron kiel ni. Dum ŝanĝo en Perpignan, ni tagmanĝas, kaj poste dum ŝanĝo en Port-Beau, ni iom plaĝumas. Ni ankaŭ tuthazarde renkontas esperantiston tie, jam por la dua fojo dum tiu ĉi vojaĝo, ĉe superbazara enirejo. Fine alveninte en Barcelono, Lino, David kaj mi estas veturataj de Sandra ĝis Can Masdeu, danke al sukcesa peto telefona pri tio al ŝi antaŭe, por havi poentan avantaĝon kontraŭ la aliaj teamoj, kiuj kunĉeestis en la lasta trajno kun ni. Tie atendas nin jam organizantoj, du aliaj teamoj, Brian (la esperantisto de Can Masdeu) kaj iu alia loĝanto tiea el Filipinoj. Ni ripozetas, estas gvidataj iom de Brian en la ejo kaj ekpreparas vespermanĝon (dume, mi akcidente tranĉas mian maldekstran dikfingron). Post vespermanĝo komuna, oni trinkas iom da vermo, babilas, ripozas, ordiĝas. Mi decidas, kune kun kelkaj aliaj, same dormi en Can Masdeu, por ne devi veturi jam antaŭ meznokto al iu hostelo hazarda kiel laŭ origina plano. Do tiel mi faras. (Daŭrigota.)



Michael Vrazitulis.

BaRok Koncertos Dum JES 2024-2025!

Ni ĝojas anonci, ke danke al la subteno de niaj patronoj kaj amikoj, la fama brazila muzikgrupo **BaRok** koncertos ekskluzive por ni la 30-an de Decembro dum JES 2024/2025 en Belgio!

Ci tiu unika okazaĵo eblos pro la helpo de V.Esp.O kaj la **Verda Skoltestro Bizono**, kiuj subtenis kaj faciligis la inviton kaj vojaĝon de la grupo el Brazilo al Eŭropo.

BaRok estas pionira bando en la Esperanto-muzika scenejo, konata pro ilia unika miksaĵo de **Folk Metal kaj Baroka muziko**. Fondita en 2007, ili fariĝis la unua bando de potenca metalo, kiu publikigis oficialan albumon en Esperanto. Ilia muziko esploras profundajn temojn pri **brazila Tupí-mitologio**, indiĝenaj kulturoj kaj la politika historio de Brazilaj unuaj loĝantoj.

Kvankam **BaRok** venos triope, ili havos subtenon de belga amiko kiel drumisto por krei plenan kaj potencon sonon. Ilia koncerto estos unu el la ĉefaj kulturaj eventoj de JES, kaj ni estas fiera gastigi ilin.

Kiel Vi Povas Subteni?

Inviti tutan muzikbandon el Brazilo estas ne malgranda defio. Por helpi financi ilian vojaĝon kaj kontribui al la **Kultura Fonduso de JES**, ni akceptas donacojn. Via subteno helpos alporti tiun mondfaman bandon rekte al vi dum la jarŝanĝa festo! Trovu nian paĝaron kaj informojn en la reto: <https://linktr.ee/junularaesemajno>

Ne maltrafu la ŝancon vidi **BaRok** viva ĉe JES 2024-2025 – ĝi estos neforgesebla travivaĵo! Ĉu vi pretas por JES 2024-2025? Aliĝu tuj!

Christine Brücker



BaRok aus Brasilien live bei JES 2024-2025!

Dank großzügiger Unterstützung von V.Esp.O und dem Verda Skoltestro konnten wir **BaRok**, die legendäre brasilianische Metalband, für einen exklusiven Auftritt am 30. Dezember 2024 bei JES gewinnen. **BaRok-Projekto – Metal, Folk und Esperanto.**

BaRok-Projekto – Metal, Folk und Esperanto.

BaRok-Projekto, gegründet 2007 von den Gitarristen Rafael Milhomem und Muniz, ist eine einzigartige Power-Metal-Band, die als erste ein offizielles Album in der Sprache Esperanto veröffentlicht hat. Ihre Musik vereint Elemente von Folk- und Power-Metal, inspiriert von barocker, klassischer und folkloristischer Musik. Die Texte drehen sich um die Tupí-Mythologie Brasiliens, die indigene Kultur und die politische Geschichte der Ureinwohner.

Seit 2021 hat die Band eine neue kreative Phase begonnen, die sie noch stärker in Richtung Folk Metal führte. Ihr EP *Kvin Jarcentoj* (2021) enthält den preisgekrönten Song *Kaŝiri'* (2020). Bereits 2016 erschien ihr erstes vollständiges Album *Sovaĝa animo*, das auf verschiedenen Plattformen veröffentlicht wurde. Auf diesem Album wirkten zahlreiche Gäste mit, und es erhielt viel Aufmerksamkeit in der Musikszene. Mit dem Track *Jen nia Viv-river'*, einem Arienstück ihrer geplanten Metal-Oper, gewannen sie den ersten Platz im Wettbewerb „Kanto de la Jaro“ (2016). Dies war das erste offizielle Metal-Album, das jemals in Esperanto veröffentlicht wurde.

Die Band begann als reines Online-Projekt, bei dem die Musiker in Heimstudios aufnahmen. Doch seit 2013 treten sie als vollständige Band auf und spielen live. Sie erhielten viel Lob für ihre Kompositionen und ihr herausragendes Können, insbesondere für ihre Single *La plej bona ĉasisto*, die ebenfalls Finalist im Wettbewerb „Kanto de la Jaro“ war.

Besonderes Konzert bei JES 2024-2025

Obwohl **BaRok-Projekto** normalerweise als vollständige Band auftritt, werden sie uns in einer Trio-Besetzung ohne Schlagzeuger besuchen. Doch keine Sorge – ein belgischer Freund wird die Band am Schlagzeug unterstützen und das Konzert unvergesslich machen! Verpasst nicht die einmalige Gelegenheit, **BaRok-Projekto** live bei JES zu erleben. Mit eurer Unterstützung an den JES-Kulturfonds helfen wir, diese großartige brasilianische Band nach Europa zu holen!

Christine Brücker

JES 2024-2025: Perfekta Jarŝanĝo en Belgio!

Ĉu vi pretas por neforgesebla semajno plena de kulturo, amuzo, kaj Esperanto?

JES revenas pli granda kaj brila ol iam ajn, kaj ĉi-jare ĝi okazos en Belgio de la 27-a de Decembro 2024 ĝis la 2-a de Januaro 2025! Imagu festi la novan jaron kun junuloj el pli ol 20 landoj, ĉiuj kun la sama celo: festi, krei memorojn kaj disvastigi la internacian lingvon en amika kaj diverseca etoso.

Kial JES Estas Speciala? JES (Junulara E-Semajno) estas la evento por junaj esperantistoj! Organizita de junuloj por junuloj, ĝi perfekte miksas ferian etoson kun riĉa kaj varia programo. De prelegoj kaj trejnadaj ĝis koncertoj kaj kulturaj vesperoj — estas io por ĉiuj gustoj. Ĉu vi volas partopreni prelegojn, konkuri en sportaj turniroj, aŭ simple ĝui la noktan diskejon? JES neniam seniluziigas!

Diversa JES. Ĉu vi ŝatas lingvojn, kulturon aŭ simple bonan muzikon? JES estas via loko. Ni festas diversecon en ĉiaj formoj — kulturoj, lingvoj, genroj — ĉio estas bonvenigita kaj subtenata! La semajno estos plena de diversaj eventoj, inkluzive de la famaj kulturaj vesperoj, kie vi povas montri viajn proprajn talentojn aŭ malkovri la mirindajn kapablojn de aliaj partoprenantoj.

Festoj, Muziko kaj Gufujo! Se vi estas muzikŝatanto aŭ simple volas moviĝi en la dancetoso, la JES-noktoj estos via plej ŝatata tempo! Koncertoj kun originalaj Esperanto-kantoj kaj dancado ĝis la mateniĝo estos ĉiutagaj eventoj. Kaj por tiuj, kiuj serĉas trankvilan angulon, la senalkohola gufujo estos la perfekta loko por babilo, ripozi kaj ĝui trankvilan vesperon antaŭ ol plonĝi reen en la festadon.

Ekscitaj Novaĵoj por Novuloj! Ĉi-jare JES ricevas grandan subtenon! Por la unua fojo, kelkaj landaj asocioj donas al novuloj ŝancon sperti ĉi tiun fenomenan eventon. La Germana Esperanto Asocio (GEA) kaj la Germana Esperanto Junularo (GEJ) ofertas specialan patronadon: ili subtenos ĉiun novan junulon el Germanio, kiu partoprenas sian unuan Esperanto-eventon, per €50! Tio estas enorma paŝo por plivigli la Esperanto-movadon kaj allogi pli da novuloj al nia internacia komunumo.

Aliĝu Nun! Ne maltrafu la plej memorindan jarŝanĝan semajnon en Belgio! Aliĝu al JES 2024-2025 kaj preparu vin por internacia festo, plena de kulturo, amuzo kaj Esperanto. Kie ajn vi estas, la JES-etoso atendas vin – ni ne povas atendi renkonti vin tie!

Informojn vi trovos en la reto sub nia paĝaro kaj sociaj kanaloj: <https://linktr.ee/junularaesemajno>

Jes estas pli ol evento, ĝi estas travivaĵo! Kun la subteno de niaj patronoj kaj asocioj, ni estas pretaj krei la plej sukcesan 15-an JES-on ĝis nun.

Christine Brücker

JES 2024-2025: Perfekter Jahreswechsel in Belgien!

Bist du bereit für eine unvergessliche Woche voller Kultur, Spaß und Esperanto?

JES kehrt größer und strahlender als je zuvor zurück, und dieses Jahr findet es in Belgien vom 27. Dezember 2024 bis zum 2. Januar 2025 statt! Stell dir vor, du feierst das neue Jahr mit jungen Menschen aus über 20 Ländern, die alle das gleiche Ziel haben: Feiern, Erinnerungen schaffen und die internationale Sprache in einer freundlichen und vielfältigen Atmosphäre verbreiten.

Was macht JES so besonders? JES (Junulara E-Semajno) ist das Event für junge Esperantisten! Von jungen Menschen für junge Menschen organisiert, bietet es die perfekte Mischung aus Urlaubsatmosphäre und einem abwechslungsreichen, spannenden Programm. Ob Vorträge, Workshops, Konzerte oder kulturelle Abende – es ist für jeden Geschmack etwas dabei. Egal, ob du an Vorträgen teilnehmen, bei Sportturnieren antreten oder einfach die nächtlichen Partys genießen möchtest – JES enttäuscht nie!

Vielfalt auf JES. Ob du Sprachen, Kultur oder einfach nur gute Musik liebst – JES ist dein Ort. Wir feiern Vielfalt in allen Formen – Kulturen, Sprachen, Geschlechter – alles wird willkommen geheißen und unterstützt! Die Woche ist vollgepackt mit verschiedenen Veranstaltungen, einschließlich der berühmten Kulturabende, bei denen du deine eigenen Talente zeigen oder die großartigen Fähigkeiten anderer Teilnehmer entdecken kannst.

Partys, Musik und das Gufujo! Wenn du Musik liebst oder einfach in Partylaune bist, werden die JES-Nächte dein Lieblingsteil der Woche sein! Tägliche Konzerte mit originalen Esperanto-Songs und Tanz bis zum Morgenrauen sind fest im Programm. Für diejenigen, die einen ruhigeren Rückzugsort suchen, ist das alkoholfreie Gufujo der perfekte Ort, um zu plaudern, sich auszuruhen und einen entspannten Abend zu genießen, bevor es zurück ins Partygeschehen geht.

Spannende Neuigkeiten für Neulinge! Dieses Jahr erhält JES große Unterstützung! Erstmals bieten einige nationale Verbände den Neulingen die Chance, dieses großartige Event zu erleben. Der Deutsche Esperanto-Bund (GEA) und die Deutsche Esperanto-Jugend (GEJ) bieten eine besondere Förderung an: Sie unterstützen jeden jungen Menschen aus Deutschland, der zum ersten Mal an einem Esperanto-Event teilnimmt, mit 50 Euro! Das ist ein großer Schritt, um die Esperanto-Bewegung zu stärken und mehr junge Menschen für unsere internationale Gemeinschaft zu begeistern.

Jetzt anmelden! Verpasse nicht die unvergesslichste Woche zum Jahreswechsel in Belgien! Melde dich für JES 2024/2025 an und bereite dich auf ein internationales Fest voller Kultur, Spaß und Esperanto vor. Wo auch immer du bist, die JES-Atmosphäre erwartet dich – wir können es kaum erwarten, dich dort zu treffen!

Weitere Informationen findest du auf unserer Website und in unseren sozialen Netzwerken: <https://linktr.ee/junularaesemajno>

JES ist mehr als nur ein Event – es ist ein Erlebnis! Mit der Unterstützung unserer Sponsoren und Verbände sind wir bereit, das bisher erfolgreichste 15. JES zu gestalten.

Christine Brücker



Gebeneluxsa Kongreso

Germana kaj Beneluxsa Kongreso

2-a ĝis 5-a de oktobro 2025

en Schleiden-Gemünd/Germanio

translime



Kie okazos la kongreso?



Schleiden – urbo en la Nacia Parko Eifel. La urbo Schleiden kun siaj 18 vilaĝoj situas en la koro de la Nacia Parko Eifel. La urbo estas nur 30 kilometrojn for de la german-belga limo, sur la Dreiborn-altebenaĵo. La kuraĉloko Kneipp Gemünd invitas vin al malstreĉa akvo-terapio en klasikaj Kneipp-instalaĵoj. La severa Eifel-vento blovas kaj lasas viajn pensojn vagi. La du urbaj centroj Gemünd kaj Schleiden bonvenigas vin en ĉiuj sezonoj. La regiona gastronomio dependas de honesta kuirarto. Spertu naturon en la *Wilder Kermeter* natur-aventura areo.



© A. Pardey

Se la vetero kaj vestaĵoj ne kunlaboras, la ekspozicio *Wilderness Dreams* de la Nacia Parko Eifel surprizas ne nur junajn vizitantojn per interagado, modeloj por flari kaj tuŝi.



© Wald und Holz NRW

La kongresejo

Junulargastejo en 53937 Schleiden-Gemünd

Moderna, komforta, proksima al la naturo – bonvenon al la nova junulargastejo Gemünd Vogelsang. Lernado kaj okazaĵloko, kiu fiksas tute novajn normojn, malfermiĝis en printempo 2020 en la populara loko de la malnova junulargastejo Schleiden-Gemünd. Enmetita en valo riĉa je arbaroj kaj akvo en la Nacia Parko Eifel, la konstruaĵo kun sia impona ligna fasado kaj grandaj travideblaj fenestraj areoj perfekte miksiĝas en la ĉirkaŭan naturon. La junulargastejo estas unu el la atestitaj naciaj parkaj gastigantoj kaj tial estas la ideala bazstacio por multaj subĉielaj agadoj.

Kun 188 litoj en 56 ĉambroj, ĝi ofertas loĝadon por grandaj grupoj. Sep kunvenejoj por ĝis 245 homoj ofertas komfortajn kunveneblojn.

Estas aliaj hotelaj litoj en la sama vilaĝo, kelkaj el kiuj estas je piedira distanco. Transporta servo estas ofertota.



© Jugendherberge Gemünd Vogelsang, 53937 Schleiden

Kiel atingi Schleiden?

Schleiden estas 45 kilometrojn for de Eupen kaj Aachen kaj 70 kilometrojn for de Kolonjo. El Belgio oni povas atingi ĝin per la rapidvojo N67, el Germanio per la aŭtovojo A1. La plej proksima fervoja stacidomo estas Kall, 55 minutojn de Kolonjo. Transporta servo estas ofertota. Rapidbuso kondukas vin de Aachen al Schleiden en du horoj. Estas translima busitinerero de Eupen kun ŝanĝo.



© Wald und Holz NRW

Programo kaj aliĝo

benelukso.eu/kongreso

Kontakto

Valona Esperanto-Asocio (V.Esp-o)
esperanto.wallonie@gmail.com
esperanto-wallonie.be

Germana Esperanto-Asocio
esperanto.de
gek@esperanto.de
 tel. 0800 3363636 5114 (nur ene de Germanio)